

Klemento de Romo

Leteroj

La martiriĝo de Klemento

El la Greka tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Enhavo:

Enkonduke al la unua letero de Klemento

La unua Letero de Klemento al la Korintanoj

La dua Letero de Klemento al la Korintanoj

La martiriĝo de Klemento

Broŝure:

Klemento de Romo

Leteroj

La martiriĝo de Klemento

El la Greka tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Voĉoj Kristanaj 34

VoKo, Rijswijk 2020

(planita)

Interrete:

La unua Letero de Klemento al la Korintanoj

https://el.wikisource.org/wiki/Κλήμεντος_προς_Κορινθίους_A

<https://bkv.unifr.ch/works/1/versions/2/divisions>

La dua Letero de Klemento al la Korintanoj

https://el.wikisource.org/wiki/Κλήμεντος_προς_Κορινθίους_B

<https://bkv.unifr.ch/works/106/versions/124/divisions/35378>

Lastfoje kontrolitaj: 2020-04-26

Enkonduke al la unua letero de Klemento

La unua letero de Klemento (\pm 96 p. Kr.) estas letero de la gvidanto de la eklezia komunumo de Romo al la Eklezia Komunumo de Korinto, kie aro da junuloj ribelis kontraŭ la gvidanto de la loka kristana eklezio. Eklezi-historie ĝi havas gravan rolon por atesti pri la decidiga influo de la estro de l' eklezio de Romo koncerne problemojn de alilokaj eklezioj. Fakuloj konsideras ĝin aŭtenta. Klemento mem mortis martire; la loka preĝejo je lia memoro en Romo troviĝas super antaŭa preĝejo je lia honoro super i. a. sanktejo de Mitrao. La tielnomata Dua Letero de Klemento efektive estas tre frukristana prediko anonima, kies dato ne estas konata.

Gerrit Isai Berveling

La unua letero de Klemento al la Korintanoj

*Κλήμεντος
προς Κορινθίους Επιστολή α*

La eklezio de Dio, kiu fremdule loĝas en Romo, al la eklezio de Dio, kiu fremdule loĝas en Korinto, al tiuj, kiuj estas vokitaj kaj sanktigitaj pro la volo de Dio per nia Sinjoro Jesuo Kristo: graco kaj paco al vi de la ĉiopova Dio abundu al vi per Jesuo Kristo.

Pardonpeto pro la malrapida reago

1:1 Pro la subitaj kaj sinsekvaj katastrofoj kaj malfeliĉoj, kiuj nin trafis, ni kredas, ke iom malfrue ni turnis nian atenton al la temoj inter vi diskutitaj, niaj karaj, kaj al la malpaco kaj la abomena kaj malsankta ribelado, kiu estas fremda al la elektitoj de Dio, kiun kelkaj obstinaj kaj arogantaj personoj ekflamigis ĝis tia grado de frenezo, ke via nomo, kiun ĉiuj homoj estimis, admiris kaj amis, estis grave lezita.

Afabla laŭdo bonveniga

2 Ĉar kiu ja foje povis gastigi inter vi, sen ke li ne laŭdus vian fidon, same ornamitan per ĉiuj virtoj kiel firman? Kiu ne admiris vian saĝan kaj moderan piecon en Kristo? Kiu ne diskonigus vian mirindan kaj grandiozan gastamon? Kiu ne gratulis vin pro via perfekta kaj sana scio?

3 Ĉar ĉion vi faris sen konsidero al la persono, kaj vi promenis laŭ la ordonoj de Dio, submetante vin al viaj regantoj kaj prezentante la ŝuldatan honoron al la aĝuloj inter vi; la junulojn prudente kaj inde vi traktis. La virinojn vi instruis plenumi siajn taskojn en senmanka kaj sankta konscienco, dum siajn edzojn ili amis, kiel decas. Kaj vi instruis al ili resti en la regulo de obeemo, en prizorgado de la mastrumado, plene diskrete.

2:1 Kaj vi ĉiuj estis humilaj kaj sen ia aroganteco, pli emaj submetiĝi ol submetadi, vi pli volonte donacis ol ricevis. Vi estis kontentaj pri la ĉiutagaj provizoj de Kristo kaj vi atentis liajn dirojn, vi metis ilin zorgeme en via koro, kaj lian Pasionon vi tenis antaŭ viaj okuloj. 2 Tiel paco profunda kaj riĉa estis donita al ĉiuj, kaj nesatigebla sopiro fari bonon. Kaj plena elverŝiĝo de sankta Spirito okazis super ĉiujn: 3 kaj, plenaj je sankta bonvolo, en nobla fervoro kaj kun pia konfido vi elstreĉis viajn manojn al la Ĉiopova Dio, petante Lin, ke Li estu indulga, se senintence iun pekon vi faris. 4 Tag-nokte vi baraktis pri la tuta frataro, ke kun kompato kaj konscienco la tuta nombro de Liaj elektitoj estu savita. 5 Reciproke vi kondukis kiel en klara lumo, nekornule kaj nemalice. 6 Ĉia kverelo, ĉiu skismiĝo al vi estis horora. Vi ploradis pri la kulpoj de viaj proksimuloj kaj iliajn mankojn vi konsideris la viaj. 7 Neniam vi bedaŭris ian bonfaron vian, pretaj je ĉiu bona faro. 8 Ornamitaj de plenvirta kaj plej honorinda vivo, je timo antaŭ Dio ĉion vi faris. La ordonoj kaj la preceptoj de la Sinjoro estis skribitaj sur la tabeloj de via koro.

Rezulto de prospero

3:1 Gloron kaj abundon vi larĝe ricevis, sed plenumiĝis kio estas skribita: *Li manĝis kaj trinkis, li grasiĝis kaj dikiĝis kaj kalcitris, la amato*¹. 2 De tio rezultis ĵaluzo kaj envio, kvereloj kaj ribelo, persekuto kaj konfuziĝo, milito kaj kaptiteco. 3 Tiel incitiĝis *la senvaloruloj kontraŭ la valoruloj*², la senhonoruloj kontraŭ la honoruloj, la stultuloj kontraŭ la saĝuloj, la junuloj kontraŭ la maljunuloj. 4 Pro tio justeco kaj paco perdis la

¹ Readmono 32:15.

² Jesaja 3:5.

interligitecon, dum ĉiu homo forlasis la timon antaŭ Dio kaj fariĝis miopa en la fido, ĉar vi ne plu promenas laŭ la preskriboj de liaj ordonoj, nek plu vivas laŭ tio, kio estas inda je Kristo, sed ĉiu sekvas la aĉajn dezirojn de sia koro, posedata de tiu maljusta kaj malpia ĵaluzo, per kiu ankaŭ la morto eniris en la mondon³.

La ĵaluzo – origino de la problemoj en Korinto, ankaŭ jam en la Sankta Skribo

4:1 Ĉar tiel estas skribite: *Kaj post ia tempo fariĝis, ke Kain alportis el la fruktoj de la tero donacoferon al Dio. Kaj Habel ankaŭ alportis el la unuenaskitoj de siaj ŝafoj kaj el ilia graso.* **2** *Kaj Dio atentis Habelon kaj lian donacoferon, sed Kainon kaj lian donacoferon Li ne atentis.* **3** *Kaj Kain tre ĉagreniĝis, kaj lia vizaĝo kliniĝis.* **4** *Kaj Dio diris al Kain: Kial vi ĉagreniĝis? kaj kial kliniĝis via vizaĝo? Ĉu ne estas tiel ke, se vi bone oferis, sed ne bone dividis, vi ja pekis?* **5** *Trankviliĝu: al vi li revenos, kaj vi regos super li*⁴. **6** *Kaj Kain parolis kun sia frato Habel: Ni ekiru sur la kampon. Kaj okazis, kiam ili estis sur la kampo, Kain leviĝis kontraŭ sian fraton Habel kaj mortigis lin*⁵. Vi do vidas, fratoj: ĵaluzo kaj envio fratomurdon rezultigis. **8** Pro ĵaluzo nia patro Jakob forkuris el la vido de sia frato Esav. **9** Ĵaluzo persekutigis Jozefon ĝismorte kaj igis lin eniri ĝis sklavecon. **10** Ĵaluzo devigis Moseon fuĝi la vizaĝon de Faraono, reĝo de Egiptujo, kiam li aŭdis samtribanon diri: *Kiu faris vin estro kaj juĝanto super ni? ĉu vi intencas mortigi min, kiel hieraŭ vi mortigis la Egipton*⁶? **11** Pro ĵaluzo Aaron kaj Mirjam tranoktadis ekster la kampadejo. **12** Ĵaluzo kaŭzis, ke Datan kaj Abiron vivaj descendis en Hadeson, ĉar ili ribelis kontraŭ Moseo, la servisto de Dio. **13** Pro ĵaluzo Davidon trafis envio, ne nur flanke de la fremduloj, sed li ankaŭ estis persekutita de Ŝaul, reĝo de Izrael.

³ Saĝeco 2:24.

⁴ Alia traduko: al vi ĝi revenos, kaj vi denove posedos ĝin.

⁵ Genezo 4:3-14.

⁶ Eliro 2:14.

Pli nuntempaj ekzemploj: martireco de Petro kaj Paŭlo

5:1 Sed, por nun transiri el la praaj ekzemploj, ni venu al la aktualaj atletoj⁷; ni prenu la noblajn ekzemplojn de nia propra generacio.

2 Pro ĵaluzo kaj envio la plej grandaj kaj plej justaj kolonoj de la eklezio estis persekutitaj kaj devis lukti eĉ ĝismorte. 3 Antaŭ niaj okuloj ni prenu la bonajn apostolojn: 4 Petro pro maljusta ĵaluzo eltenis ne unu aŭ du, sed tiom da suferoj! kaj post kiam tiel sian ateston li donis⁸, li iris al la glora loko destinita al li. 5 Pri ĵaluzo kaj malpaco Paŭlo montris la trofeon de l' eltenemo. 6 Sesfoje katenojn li portis; ekzilata li estis, ŝtonumita, fariĝinte heroldo en oriento same kiel en okcidento, kaj li ricevis la noblan famon de sia fido. 7 Instruite la justecon al la tuta mondo, kaj atinginte la limojn de la okcidento, kaj liverinte sian ateston al la regantoj, li tiel foriris el tiu ĉi mondo, kaj li formigris al la sankta loko, kiel grandega ekzemplo de eltenemo.

La Romaj martiroj sub Nerono

6:1 Al tiuj ĉi homoj, kiuj vivis sanktece, aliĝis granda amaso da elektitoj, kiuj suferinte pro ĵaluzo multajn insultojn kaj torturojn fariĝis inter ni mirindaj ekzemploj.

2 Pro ĵaluzo virinoj estis persekutitaj, kiel Danaidinoj kaj Dirkainoj, suferante terurajn kaj malpiajn perfortojn; ili atingis sekure la celon en la vetkuro de la fido, kaj ricevis fine la noblan premion, kvankam laŭkorpe estante malfortaj.

3 Ĵaluzo fremdigis edzinojn de iliaj edzoj, kaj misŝanĝis la diron de nia patro Adam: *Jen tio estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno*⁹. 4 Ĵaluzo kaj malpaco renversis grandajn urbojn kaj elradikigis grandajn popolojn.

⁷ En frua kristanismo regule oni uzis terminojn el sporto por martireco. Vidu ekzemple Tertuliano – *Al la Martiroj*, en *Antologio Latina* 5, p. 61 k. s.

⁸ La greka vorto *martys* aŭ *martiro* = atestanto.

⁹ Genezo 2:23.

Admono al pentemo

7:1 Tiujn ĉi aferojn, miaj karaj, en tiu ĉi letero ni ne skribas nur por admoni vin, sed ankaŭ por memori nin mem; ĉar ni fosas en la sama sulko, la sama lukto atendas nin. 2 Tial ni rezignu pri vanaj kaj stultaj pensoj: ni konformiĝu al la glora kaj respektinda regulo de nia tradicio. 3 Kaj ni vidu, kio estas bona, kio plaĉas kaj kio agrablas antaŭ nia Kreinto. 4 Ni fikse rigardu la sangon de Kristo kaj ni konsciu, kiel valora ĝi estas ĉe lia Patro, ĉar verŝita por nia saviĝo ĝi ebligis al la tuta mondo la gracon de la pentofaro.

5 Ni trairu ĉiujn generaciojn kaj ni lernu, ke en generacio post generacio la Sinjoro donis eblon je pentofaro al tiuj, kiuj volis reveni al li. 6 Noa heroldis pentofaron, kaj kiuj aŭskultis lin, saviĝis. 7 Jona heroldis al la Nineveanoj la renversiĝon <de la urbo>; sed ili tuj pentofaris pri siaj pekoj, repaciĝis kun Dio kaj ricevis saviĝon, kvankam ili estis fremduloj por Dio.

Dio promesis pardoni la pekulon

8:1 La ministroj de la Dia graco parolis per la Sankta Spirito pri pentofaro. 2 Ankaŭ la Sinjoro de ĉio mem parolis pri pentofaro, kun ĵuro: *Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, Mi deziras ne tiom la morton de la malvirtulo, kiom lian pentofaron*¹⁰. Kaj li aldonis bonan sentencon: 3 *Deturnu vin, ho domo de Izrael, de viaj malbonaj vojoj! Diru al la idoj de Mia popolo: Eĉ se viaj pekoj etendiĝus de la tero al la ĉielo, kaj se ili estus ruĝaj kiel skarlatoj kaj estus pli nigraj ol sakaĵo, se vi turniĝus al Mi el tuta koro kaj dirus: Patro, Mi aŭskultos vin kiel Mian sanktan popolon*¹¹. 4 Kaj aliloke Li ankaŭ diras jene: *Lavu vin kaj purigu vin; forigu antaŭ Miaj okuloj la malbonaĵojn de via animo; ĉesigu pri viaj malbonaĵoj, lernu fari la bonon, celu justecon, helpu prematon, havigu juston al orfo, juste konduku al vidvino. Venu, kaj ni faru inter ni juĝan disputon, diras la Sinjoro; se viaj pekoj eĉ estus purpuraj, Mi ilin faros neĝe blankaj. Kaj se ili estus kiel skarlatoj, Mi faros ilin blankaj kiel lano. Se vi pretos*

¹⁰ Jeĥezkel 33:11 k. s.

¹¹ Cito ne klara.

aŭskulti Min, vi manĝos la bonaĵon de la tero; sed se vi rifuzos kaj ne aŭskultos, glavo ekstermos vin; ĉar tiel diris la buŝo de la Sinjoro¹².

5 Dezirante do, ke ĉiuj liaj amatoj partoprenu en la pentofarado, per Sia Ĉiopova Volo Li konfirmis tion.

Admono al obeemo

9 :1 Ni obeu do Lian volon plenan je grandeco kaj majesto, kiel petegantoj ĉe Lia pardonemo kaj bonvolo, kaj ni adorkliniĝu antaŭ Li. Ni turnu nin al Lia kompatemo, forlasante la vanajn penadojn, la malpacon kaj la ĵaluzon, kiu kondukas al la morto. 2 Ni fiksi la okulojn sur tiujn, kiuj perfekte zorgis pri Lia impona gloro.

3 Ni prenu Henoĥon¹³, kiu montriĝis justulo pro sia obeemo; li estis levita supren, kaj pri lia morto oni ne plu trovis spurojn. 4 Noa montriĝis fidela, predikis per sia ministrado renaskiĝon al la mondo, kaj per lia zorgado la Sinjoro savis la vivularon, kiu en konkordo eniris en la arkeon.

La ekzemplo de Abraham

10 :1 Abraham, kiu estis indikita kiel amiko de Dio, montriĝis fidela, ĉar li obeis la parolojn de Dio. 2 Pro obeo, li eliris el sia lando, el sia familio kaj el sia patrodomo, por ke anstataŭ eta landeto, modesta parenkaro kaj malgranda domo li heredu la promesojn de Dio. Ĉar tiel Dio diris al li: 3 *Iru el via lando, el inter via parenkaro, kaj el la domo de via patro, al la lando, kiun Mi montros al vi. Kaj Mi faros vin granda popolo, kaj Mi benos vin kaj grandigos vian nomon, kaj vi estos beno. Kaj Mi benos viajn benantojn, kaj viajn malbenantojn Mi malbenos, kaj beniĝos per vi ĉiuj gentoj de la tero¹⁴.* 4 Kaj alifoje, kiam li apartiĝis de Lot, diris al li Dio: *Levu viajn okulojn, kaj rigardu de la loko, sur kiu vi nun estas, norden kaj suden, orienten kaj okcidenten; ĉar la tutan teron, kiun vi vidas, Mi donos al vi kaj al via idaro por*

¹² Jesaja 1:16-20 .

¹³ Zamenhof uzis la formon Henoĥ. La Biblia Komitato faris tion Ĥanoĥ.

¹⁴ Genezo 12:1-3.

eterne. 5 Kaj Mi faros vian idaron kiel polvo de la tero; se iu povas kalkuli la polvon de la tero, li kalkulos ankaŭ vian idaron¹⁵. 6 Kaj ankaŭ estas dirite: Dio elirigis lin eksteren, kaj diris: Rigardu al la ĉielo kaj kalkulu la stelojn, se vi povas ilin kalkuli. Tiel estos via idaro. Abraham kredis Dion, kaj tio estis kalkulita al li kiel virto¹⁶.

7 Pro lia fido kaj pro lia gastameco estis donita al li filo en lia maljunaĝo, kaj pro obeemo li prezentis lin ofere al Dio sur unu el la montoj, kiun Li indikis al li.

La ekzemplo de Lot

11:1 Pro gastameco kaj pieco Lot saviĝis el Sodom, dum la tuta ĉirkaŭaĵo estis juĝita en fajro kaj sulfuro. La Sinjoro klare montris, ke li ne delasas tiujn, kiuj fidas je li, sed ke tiujn, kiuj devojiĝas, li punas kaj tormentas. 2 Ĉar kiam lia edzino kun li eliris, sed malsame pensanta kaj ne en konkordo, ŝi estis starigita kiel signo pri tio, tiel ke ŝi fariĝis salkolono ĝis la nuna tago, por ke estu sciata de ĉiuj, ke la dubantoj kaj kiuj hezitas pri la potenco de Dio fariĝas juĝo kaj simbolo por ĉiuj generacioj.

La ekzemplo de Raĥab

12:1 Pro fido kaj gastameco saviĝis la putino Raĥab¹⁷. 2 Ĉar kiam Josuo, filo de Nun, sendis esploristojn en Jeriĥon, la reĝo de la lando eksciis, ke ili venas esplori ilian landon, kaj sendis virojn por kapti ilin, por ke li kaptu kaj mortigu ilin. 3 Kaj tiam la gastama Raĥab akceptis kaj kaŝis ilin sur la tegmento en la trunkoj de la lino. 4 Kiam la senditoj de la reĝo venis kaj diris: La esploristoj de nia lando venis ĉi tien al vi; elirigu ilin, ĉar la reĝo tiel ordonas, ŝi respondis: Efektive venis al mi la viroj, kiujn vi serĉas, sed ili tuj foriris, kaj ili nun estas sur la vojo. Kaj ŝi indikis al ili la malan direkton. 5 Kaj al la viroj ŝi diris: Mi certege scias, ke la Sinjoro transdonis al vi tiun ĉi landon, kaj timo kaj teruro pri vi falis sur tiuj, kiuj ĝin loĝas. Se do okazos, ke vi kaptas ĝin, savu do nin, min kaj la domon

¹⁵ Genezo 13:14.16.

¹⁶ Genezo 15:5-6.

¹⁷ Josuo 2.

de mia patro. 6 kaj ili diris al ŝi: Tiel estu, kiel vi diris al ni. Sed tuj kiam vi scios, ke ni alvenas, vi kunvenigu ĉiujn la viajn sub via tegmento, kaj ili saviĝos; ĉar ĉiuj kiuj troviĝos ekster ĝi, pereos. 7 Kaj ili proponis al ŝi doni signon, ke el sia domo ŝi elpendigu skarлатаĵon, tre klare montrante, ke per la sango de la Sinjoro estos saviĝo por ĉiuj, kiuj fidas kaj esperas je Dio. 8 Vi vidas, amatoj, ke en tiu ĉi virino estis ne nur la fido, sed ankaŭ profeteco.

Admono al humileco

13:1 Tial ni estu humilaj, fratoj, formetinte ĉiun formon de aroganteco kaj vanteco, stulteco kaj kolero, kaj ni plenumu tion, kio estas skribita, ĉar tiel diras la sankta Spirito: *Ne fieru saĝulo pri sia saĝeco, ne fieru fortulo pri sia forteco, nek fieru riĉulo pri sia riĉeco, sed kiu fieras, tiu fieru en la Sinjoro*¹⁸ por serĉi lin kaj fari la juĝon kaj la justecon, memorante la parolojn de la Sinjoro Jesuo, kiujn li eldiris instruante toleremon kaj eltenemon. 2 Ĉar tiel li diris: *Kompatu, por ke kompaton vi ricevu, pardonu, por ke oni estu al vi pardonemaj, ĉar kiel vi agas, tiel oni ree agos al vi: kiel vi donacos, tiel oni donacos al vi, kiel vi juĝos, tiel oni juĝos pri vi, kiel vi estos afablaj, tiel oni estos afablaj al vi; per kia mezuro vi mezuros, per tia oni mezuros vin*¹⁹.

3 Per tia ordono kaj tiaj preceptoj ni firmigu nin por ekiri obeemaj al liaj sanktaj vortoj, humilaj; ĉar la Sankta Skribo diras: 4 *Kiun Mi rigardos, se ne la humilulon kaj la pacemulon, kiu timas antaŭ miaj vortoj*²⁰?

Alvoko al mildeco

14:1 Estas do juste kaj sankte, viroj-fratoj²¹, ke ni estu pli obeemaj al Dio ol ke ni sekvu tiujn, kiuj kun aroganteco kaj netraktebleco faris sin estroj ĉe ĉi tiu fia envio. 2 Ĉar ne ordinaran, sed grandan danĝeron ni riskas, kiam ni lasas nin blinde treni de voloj de homoj, kiuj kreas malpacon kaj

¹⁸ Jeremia 9 :23-24.

¹⁹ Laŭ Mateo 5-6-7.

²⁰ Jesaja 66: 2.

²¹ Ĝis tie ĉi la indiko «fratoj» por la alparolatoj povus esti identa kun «fratoj kaj fratinoj» kune, sed ĉi tie estas klare «viroj-fratoj».

kverelon por fremdigi nin de tio, kio estas bona. 3 Ni estu reciproke bonvolaj laŭ la kompatemo kaj dolĉeco de nia Kreinto. 4 Ĉar estas skribite: *La bonuloj loĝos la teron, kaj la senkulpuloj estos lasitaj sur ĝi, sed la pekuloj ekstermiĝos de ĝi.* 5 Kaj oni plu diras: *Mi vidis la malpiulon ekzaltita, altigita kvazaŭ la cedroj de Lebanon; kaj mi preteriris kaj jen, li ne plu estis, kaj mi serĉis lian lokon, sed mi ne trovis. Gardu vian senkulpecon, kaj atentu justecon, ĉar estas restaĵo por la pacema homo*²².

Averto kontraŭ hipokrituloj pri paco

15:1 Ni do alkroĉiĝu al tiuj, kiuj pie praktikas la pacon, ne al tiuj, kiuj hipokrite ĝin volas. 2 Ĉar ie li diras: *Tiu ĉi popolo honoras min per siaj lipoj, sed ilia koro estas malproksime de mi*²³ 3 kaj same: *Per la buŝo ili benas, kaj interne ili malbenas*²⁴ 4 kaj aliloke : *Ili flatis lin per sia buŝo, kaj per sia lango ili mensogis al li; ĉar ilia koro ne estis firma al li, kaj ili ne estis fidelaj en lia interligo*²⁵. 5 Tial mutiĝu la mensogaj buŝoj, kiuj parolas arogante kontraŭ piulo²⁶. Kaj ree: *La Sinjoro ekstermu ĉiun flatan buŝon, kaj langon fanfaronantan, tiujn, kiuj diras: Per nia lango ni venkos, nia buŝo estas kun ni; kiu estas sinjoro super ni*²⁷? 6 Pro la mizero de la senhavuloj kaj pro la plorĝemoj de la malriĉuloj Mi nun leviĝos, diras la Sinjoro: mi starigos min ilia savo. 7 Mi sentime parolos en tio²⁸.

Ekzemploj de humileco: unuavice Jesuo Kristo

16:1 Kristo fakte apartenas al la humiluloj, ne al tiuj, kiuj levas sin super lia grego. 2 La sceptro de la majesto de Dio, la Sinjoro Jesuo Kristo, ne venis kun pompo de aroganteco aŭ orgojlo, kvankam li povus, sed kun menso humila, kiel parolis pri li la sankta Spirito: tiu ja diras: 3 *Kiu kredus*

²² Nekonata cito.

²³ Marko 7:6.

²⁴ Psalmo 62:4.

²⁵ Psalmo 78:36-37.

²⁶ Psalmo 31:18.

²⁷ Psalmo 12:3-4.

²⁸ Cito ne klara.

al tio, kion ni aŭdis? kaj super kiu malkaŝiĝis la brako de la Sinjoro? Ni anoncis antaŭ li, ke li estas kiel infano, kiel radiko en la tero soifanta. Li ne havis staturon nek gracon; kaj ni rigardis lin, kaj li ne havis aspekton nek belecon, sed lia aspekto estis sen plaĉo, pli malbela ol la aspekto de la homoj. Li estis homo de suferoj kaj penegado kaj konscia porti malforton, ĉar li deturnis sian vizaĝon, kaj estis malestimata kaj havis por ni nenian valoron. 4 Li portis niajn pekojn kaj pro ni li suferis, kaj ni opiniis lin plagita kaj batita kaj en mizero. 5 Li estis vundita pro niaj krimoj, dispremita pro niaj krimoj. Puno por nia paco estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis. 6 Ni ĉiuj erarvadis kiel ŝafoj, ĉiu iris sian vojon. 7 Kaj la Sinjoro transdonis lin pro niaj pekoj, kaj li ne malfermis la buŝon, dum li afliktiĝis. Kiel ŝafo li estis kondukita al buĉo; kaj kiel ŝafido senvoĉa antaŭ la tondantoj, tiel li ne malfermis sian buŝon. En sia humiliĝo li perdis la juĝon. 8 Pri lia generacio kiu klarigos? Ĉar lia vivo estas forigita de la tero. 9 Per la kulpoj de mia popolo li venis al la morto. 10 Kaj mi donos maliculojn por lia entombigo, kaj riĉulojn anstataŭ lia morto; ĉar li ne faris maljustaĵon, kaj trompo ne estis en lia buŝo. Kaj la Sinjoro volis purigi lin de liaj batoj. 11 Se vi oferas pro peko, via animo vidos longan posteularon. 12 La Sinjoro volas forpreni el la suferoj de lia animo, Li montros al li lumon kaj remodlos lin kun kompreno, kaj Li justigos tiun ĉi justulon, kiu estis bona servanto por multaj. Kaj iliajn pekojn li forportos. 13 Ĝuste tial li heredos multajn, kaj li dividos la predon de la fortuloj kompanse por tio, ke lia animo estis forlasita en la morton, kaj ke li estis kalkulita inter la malpiuloj. 14 Kaj li forportis pekojn de multaj, kaj pro iliaj pekoj li estis transdonita²⁹.

15 Kaj ree li mem diras: Sed mi estas vermo kaj ne homo; mokata de la homoj, malestimata de la popolo. 16 Ĉiuj, kiuj vidas min, insultas min, parolaĉas per la buŝo, balancas la kapon, dirante: Li apogis sin al la Sinjoro: Tiu helpu lin; tiu savu lin, se Li amas lin³⁰.

17 Vi vidas, amataj viroj, kio estas la ekzemplo, donita al ni: ĉar se la Sinjoro tiom humiliĝis, kion do faru ni, kiuj venis per li sub la jugon de lia graco?

²⁹ Jesaja 53, kun iom da ŝanĝoj.

³⁰ Psalmo 22:6-8.

Ekzemploj de humilo ĉe la profetoj, Abraham, Ijob kaj Moseo

17:1 Ni imitu ankaŭ tiujn, kiuj vestitaj en kaprinaj kaj ŝafaj feloj rondiris predikante la alvenon de Kristo. Ni celas Elijan kaj Eliŝan kaj same Jeĥezkelon, la profetojn, kaj krome ankaŭ la bone atestintojn.

2 Grandioze estis atestite pri Abraham kaj li nomiĝis amiko de Dio, kaj rigardante la gloron de Dio, li diris humile: *Mi estas polvo kaj cindro*³¹.

3 Pri Ijob estas tiel skribite: *Ijob estis honesta, justa, verama, diotima, kaj evitadis malbonon*³². 4 Tamen li akuzis sin mem: *Neniu estas senmakula, eĉ se li vivas nur unu tagon*³³.

5 Moseo nomiĝis *fidela en Mia tuta domo*³⁴ kaj per lia servado Dio punis Egiptujon per ulceroj kaj plagoj: sed ankaŭ li, kvankam grande glorata, ne sin laŭdis, sed kiam orakolo estis donita al li ĉe la rubuso, li diris: *Kiu estas mi, ke Vi min sendu*³⁵? 6 Li diris: *Mi estas nur vaporo el kaldrono*³⁶.

Ekzemplo de humilo de David

18:1 Sed kion ni diru pri David, pri kiu estis atestite? Dio diris pri li: *Mi trovis Davidon, filon de Jiŝaj, viron laŭ Mia koro; kun eterna korfavoro Mi sanktoleis lin*³⁷. 2 Tamen ĝuste li diris al Dio: *Korfavoru min, ho Dio, laŭ Via granda kompatemo, kaj laŭ la amplekso de Via pardonemo forstreku mian misfaron; 3 lavu min tute pura de mia krimo, kaj purigu min de mia peko; ĉar mian kulpon mi konscias, kaj mia peko staras senĉese antaŭ mi. 4 Antaŭ Vi sola mi pekis, kaj mi faris tion, kio estas malbona antaŭ Vi; tial Vi estas justa en Viaj vortoj kaj Vi venkos se oni juĝus pri Vi. 5 Jen, en krimo gravediĝis pri mi, kaj en pekoj min naskis mia patrino. 6 Jen, Vi amas la veron; la malklaron kaj kaŝitecon de la saĝo Vi aperigas al mi. 7 Vi aspergos min per hisopo kaj mi puriĝos; Vi*

³¹ Genezo 18:27.

³² Ijob 1:1.

³³ Komparu Ijob 14:4-5.

³⁴ Nombroj 12:7.

³⁵ Eliro 3:11.

³⁶ Nekonata cito.

³⁷ Psalmo 89:20.

lavos min kaj mi estos pli blanka ol neĝo. 8 Vi aŭdigos min pri gajeco kaj ĝojoj; kaj jubilos miaj humiligitaj ostoj. 9 Forturnu Vian vizaĝon de miaj pekoj, kaj ĉiujn miajn krimojn elstreku. 10 Koron puran kreu al mi, ho Dio, kaj spiriton fidelan novigu en miaj internaĵoj. 11 Ne forpuŝu min de Via vizaĝo, kaj Vian sanktan spiriton ne forprenu de mi. 12 Redonu al mi la ĝojon de Via helpo, kaj per spirito gvidanta fortikigu min. 13 Mi instruos al la krimuloj Vian vojon, kaj pekuloj revenos al Vi. 14 Liberigu min de sango, ho Dio, Dio de mia savo. 15 Ĝojos mia lango pri Via justeco. Sinjoro, malfermu mian buŝon; kaj miaj lipoj ĝojos pri Via laŭdo. 16 Ĉar se Vi dezirus oferon, mi donus ĝin; sed Vi ne ŝatas bruloferojn. 17 Ofero al Dio estas spirito pentinta; koron pentintan kaj humiligitan Dio ne malŝatos³⁸.

Konkludo kaj transiro

19 :1 Tiaj kaj tiuj do, pri kiuj estis atestite pri humileco kaj submetiĝo, per sia obeo faris ne nur nin pli bonaj, sed ankaŭ la generaciojn antaŭ ni, kaj same tiujn, kiuj akceptis liajn vortojn en respekto kaj vero. **2** Ĉar nun ni estas partoprenantoj en multaj kaj grandaj agoj, ni haste revenu al la celo de la paco, kiun dekomence ni ricevis, kaj ni fikse rigardu al la Patro de tuta tiu ĉi mondo, kaj ni ligiĝu al liaj grandiozaj kaj mirindaj donoj kaj bonfaroj de la paco. **3** Ni rigardu al Li enmense, kaj per la okuloj de la animo ni vidu Lian longpacienca planon; ni konsciiĝu, kiel senkolere Li kondutas al Sia tuta kreo.

La harmonio en la universo: instruo submetiĝi

20 :1 La ĉieloj, movataj de Liaj reguloj, en paco submetiĝas al Li. **2** Tago kaj nokto trairas sian de Li indikitan vojon, neniom ĝenante la alian. **3** La suno kaj la luno kaj la ĥoroj de la steloj laŭ la harmonio estigita de Li rondiras inter la limoj fiksitaj por ili, en konkordo, sen iu ajn devojiĝo. **4** La tero, graveda je fruktoj, liveras en siaj tempoj por homoj kaj bestoj kaj ĉiuj estaĵoj, kiuj vivas sur ĝi, abundan nutraĵon laŭ Lia volo, sen protesto aŭ ŝanĝo de la reguloj, kiujn Li preskribis. **5** La nesondeblajn leĝojn de la abismo kaj la nedireblajn regionojn de l' subterejoj kuntenas

la samaj ordonoj. 6 La baseno de la senfina maro, realigita de Lia fakuleco por aranĝi la akvojn, neniam transpasas la barojn, metitajn al ĝi, sed kiel Li ordonis al ĝi, tiel ĝi faras. 7 Ĉar Li diris: *Ĝis ĉi tie aliru, sed ne plu, kaj ĉi tie rompiĝados viaj ondoj*³⁹. 8 La oceano, senfina por la homoj, kaj la mondoj trans ĝi⁴⁰ estas regataj de la samaj ordonoj de la Sinjoro. 9 La sezonoj printempo, somero, aŭtuno kaj vintro laŭvice cedas en paco unu al la alia. 10 La ventoj en siaj ŝirmejoj siatempe plenumas sian servadon sen perturboj. La eterne fluantaj fontoj, kreitaj por la plezuro kaj la sano, senhalte prezentas siajn mamojn por la vivo de la homoj. Eĉ la plej etaj bestetoj formas siajn kunvenojn en konkordo kaj paco.

11 Ĉion ĉi la granda Artisto kaj Mastro de la universo en paco kaj harmonio ordonis estiĝi, bone farante pri la tuto, sed plej disipe pri ni, kiuj rifuĝas ĉe Lia kompatemo per nia Sinjoro Jesuo Kristo. 12 Al tiu estu la gloro kaj la majesto por eterna eterneco. Amen.

Alvoko al vere kristana vivo

21:1 Atentu, miaj karaj, por ke liaj bonfaroj, kiuj estas multaj, ne fariĝu juĝoj pri ni, se ni ne inde promenante faras, kio antaŭ li estas bona kaj plaĉa, en konkordo. 2 Ĉar ie li diras: *La spirito de la Sinjoro estas lampo, kiu esploras la internaĵojn de la ventro*⁴¹. 3 Ni do vidu, kiel apude li estas, kaj ke nenio el niaj pensoj kaj de niaj rezonadoj eskapas lin. 4 Estas do juste, ke liaj deziroj ni ne forlasu. 5 Prefere ni ofendu la malsaĝajn kaj senpripensajn kaj fierajn homojn, kiuj paradas pri la aroganteco de siaj diroj, ol Dion. 6 La Sinjoron Jesuon Kriston, kies sango pro ni estis verŝita, ni riverencu; niajn antaŭirantojn ni respektu, la pliaĝulojn ni honoru, la junulojn ni eduku en timo antaŭ Dio, niajn virinojn ni direktu sur la la vojo al la bono. 7 La amindan emon al pureco ili elmontru, la sinceran volon je mildeco ili prezentu, la regadon de sia lango ili faru klara per sia silentado, sian amon ili disdonu ne laŭ siaj preferoj, sed al ĉiuj, kiuj timas antaŭ Dio, en sankteco. 8 Niaj infanoj partoprenu en la

³⁹ Ijob 38:11.

⁴⁰ Li do lasas tiun eblon malferma!

⁴¹ Sentencoj 20:27.

eduko en Kristo: ili lernu, kiel forta estas antaŭ Dio la humileco, kiel potencas ĉe Dio pura amo, kiel bela kaj granda estas timo antaŭ li, kaj savas ĉiujn, kiuj sanktece vivas en li kun pura koro. 9 Ĉar li traserĉas niajn planojn kaj dezirojn, lia spiro estas en ni, sed kiam al li plaĉas, li forprenas ĝin.

La fido en Kristo konfirmas tion

22:1 Ĉion ĉi konfirmas la fido, kiu estas en Kristo, ĉar li mem per la sankta Spirito invitas nin: *Venu, infanoj, aŭskultu min; pri timo antaŭ la Sinjoro mi vin instruos.* 2 *Kiu estas la homo, kiu deziras vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn?* 3 *Gardu vian langon kontraŭ malbono, kaj vian buŝon kontraŭ mensoga parolo.* 4 *Dekliniĝu de malbono kaj faru bonon.* 5 *Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin.* 6 *La okuloj de la Sinjoro estas turnitaj al la justuloj, kaj Liaj oreloj al iliaj petoj: la vizaĝo de la Sinjoro estas kontraŭ tiuj, kiuj faras malbonon, por ekstermi de la tero la memoron pri ili.* 7 *ekkriis la justulo, kaj la Sinjoro lin aŭskultis, kaj de ĉiuj liaj mizeroj Li lin savis.* 8 *Multaj estas la suferoj de la pekulo, sed tiujn, kiuj fidas je la Sinjoro, la kompatemo ĉirkaŭas*⁴².

Malfeliĉaj tiuj, kiuj dubas

23:1 La Patro, kiu en ĉio estas pardonema kaj bonfara, kompatemas pri tiuj, kiuj timas antaŭ Li, kaj afable kaj ameme donas Sian gracon al tiuj, kiuj alproksimiĝas al Li en simpla menso. 2 Tial ni ne estu dumensaj, nek indulgu nia animo pri Liaj supermezuraj kaj gloraj donoj. 3 Longe for estu de ni tiu Skribo, kie diriĝas: *Malfeliĉo al tiuj, kies animoj estas malsimplaj, kiuj dubas kaj diras al si: Tion ni aŭdis ankaŭ en la tagoj de niaj patroj, kaj jen, ni oldiĝis, sed nenio el ĝi jam okazis al ni.* 4 *Vi stultaj, komparu vin kun arbo, ekzemple kun vitarbo: unue ĝi perdas la foliojn, jen kreskas ĝermo, jen folio, jen floro, kaj post tio kruda bero, fine uvo*⁴³. Vi vidas, en kiel mallonga tempo maturiĝas la frukto de la arbo. 5 Vere, rapide kaj subite

⁴² Psalmo 34:11-19 .

⁴³ Nekonata cito.

plenumiĝos lia volo. Pri tio atestas ankaŭ la Skribo: *Baldaŭ li venos kaj ne malfruos; kaj subite venos en Sian templon la Sinjoro, kiun vi serĉas*⁴⁴.

La estonta resurekto: bildigita en naturaj fenomenoj

24:1 Ni rimarku, miaj karaj, kiel la Sinjoro montras al ni la estontan resurekton, kies primicojn li ekzemplis en la Sinjoro Jesuo Kristo, restariginte lin el la mortintoj. 2 Ni konsideru, miaj karaj, la resurekton, kiu okazas en sia propra tempo. 3 La tago kaj la nokto klarigas al ni resurekton: ekdormas la nokto, leviĝas la tago: la tago foriras, la nokto sekvas.

4 Ni prenu la fruktojn: kiel kaj kiumaniere okazas la semado? 5 Eliras la semanto kaj li ĵetas sur la teron ĉiun el la semoj, kaj ĉiuj ĉi falas sur la teron, sekaj kaj nudaj, kaj disfalas : tiam el tiu disfalo la grandiozo de la providenco de la Sinjoro restarigas ilin, kaj el ĉiu unuopa semo ili obliĝas kaj fruktiĝas.

La fenikso, simbolo de la resurekto

25:1 Ni konsideru la mirindan signon, kiu okazas en la orientaj regionoj, nome ĉirkaŭ Arabio. 2 Ĉar estas birdo, kiu nomiĝas fenikso⁴⁵: tiu, unika en sia specio, vivas kvincent jarojn, kaj kiam ĝi alvenis al la tempo de sia disfalo, ke ĝi mortu, ĝi faras al si el incenso, mirho kaj aliaj aromaĵoj neston, en kiun ĉe la pleniĝo de la tempo ĝi eniras kaj mortas. 3 El la putranta karno estiĝas certa vermo, kiu nutriĝante el la sukaj de la mortinta fariĝas flugilhava; poste adoltiĝinte ĝi levas tiun neston, en kiu estas la ostoj de la antaŭulo, kaj kun ĝi el la Araba regiono vojaĝas ĝis Egiptujo, al la urbo Heliopolo, Urbo de la Suno. 4 Kaj dumtage, dum ĉiuj ĝin vidas, fluginte al la altaro de la suno, ĝi metas ĉion sur ĝin, kaj post tio ĝi reiras. 5 Tiuj pastroj do kontrolas la registrojn de la tempoj kaj konstatas, ke kompletiĝis la kvincent jaroj.

⁴⁴ Malaĥi 3:1.

⁴⁵ Vidu ĉe Laktancio en *Antologio Latina* 5.

La resurekto pruvita el la Skriboj

26:1 Ĉu io granda kaj mirinda ni ĝin do opiniu, se la Farinto de la universo estigos la resurekton de tiuj, kiuj servis al Li sanktece en la konfido de la bona fido, kiam eĉ per birdo Li jam montras al ni la grandiozon de Sia mesaĝo?

2 Ie ja jam estas dirite: Vi min restarigos, kaj mi Vin laŭdos, aŭ: *Mi kuŝiĝis kaj mi dormis, mi vekigis, ĉar Vi estas kun mi*⁴⁶. 3 Kaj Ijob aldonis siavice: Kaj Vi restarigos tiun ĉi mian karnon, kiu suferis ĉion ĉi⁴⁷.

La fideleco de Dio

27:1 Kun tiu ĉi espero do niaj animoj alkroĉiĝu al Tiu, kiu fidelas je siaj promesoj kaj al siaj juĝoj. 2 Kiu ordonis ne mensogi, Tiu des pli ne mensogas. Ĉar ĉe Dio nenio estas neebla, krom mensogi. 3 En ni do ni rebruligu la fidon je Li, kaj ni konsciiĝu, ke ĉio estas proksima al Li. 4 Per Sia majesta vorto la tuton Li kunmetis, kaj per Lia vorto ĉio povas detruigi. 5 *Kiu diros al Li: Kion Vi faris? aŭ rezistos la potencon de Lia forto?*⁴⁸ Ĉion Li faros, kion Li volas kaj kiel Li ĝin volas; kaj nenio neniigis el ĉio, kion Li dekretis. 6 Ĉio staras antaŭ Li, kaj nenio kaŝiĝas al Lia deziro. 7 Ĉar *La ĉieloj rakontas la gloron de Dio, kaj la farojn de Liaj manoj raportas la ĉiela firmaĵo. Tago al tago transdonas diron, kaj nokto al nokto faras sciigon, sen paroloj kaj sen vortoj; oni ne aŭdas ilian voĉon*⁴⁹.

Nenio eskapas Dion

28:1 Ĉar ĉio estas vidata kaj aŭskultata, ni do timu antaŭ Li kaj ni forlasu la malpurajn dezirojn pri maldecaĵoj, por ke ni estu protektataj de Lia kompatemo kontraŭ la venonta juĝo. 2 Ĉar kie povas iu ajn el ni eskapi de Lia potenca mano? Kaj kiu mondo akceptos nin se ni dizertus el Lia

⁴⁶ Psalmo 3:5.

⁴⁷ Komparu kun Ijob 19:25-26.

⁴⁸ Saĝeco 12:12.

⁴⁹ Psalmo 19 :1-3.

servo? Ĉar diras ja ie la Skribo: 3 *Kien mi iros for de Via spirito? Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo? Se mi leviĝos al la ĉielo, Vi estas tie; se mi foriros al la ekstremaĵoj de la tero, tie estas Via dekstra mano; se mi descendus en la abismojn, tie estas Via spirito*⁵⁰. 4 Kien do oni foriru, aŭ kien fuĝu de antaŭ Li, kiu la tuton havas en Siaj manoj?

La kristanoj, popolo elektita de Dio

29 :1 Tial ni do proksimiĝu al Li en sankteco de animo, levante al Li purajn kaj senkulpajn manojn, amante nian karan kaj kompateman Patron, kiu faris nin por Si elektita porcio. 2 Ĉar tiel estas skribite: *Kiam la Plejaltulo donis landojn al la popoloj, kiam Li disloĝigis la homidojn, Li starigis la limojn de la popoloj laŭ la nombro de la anĝeloj de Dio; sed la porcio de la Sinjoro estis Lia popolo Jakob; Lia heredaĵa porcio estis Izrael*⁵¹. 3 Kaj en alia loko estas dirite: *Jen, la Sinjoro prenas por Si unu nacion el ĉiuj nacioj, same kiel homo rikoltas la primicojn de sia draŝejo, kaj el tiu nacio aperos la Sankta el la Sanktuloj*⁵².

Se ni estas sankta popolo, ni do vivu sankte

30 :1 Estante sankta porcio, ni do praktiku ĉion, kio apartenas al tiu sankteco, kaj tial ni fuĝu klaĉadon, malpurajn kaj maldecajn brakumojn, ebrion, rivoltojn, abomenindajn dezirojn, fian adulton kaj teruran trofieron. 2 Ĉar Dio, estas dirite, kontraŭstaras al la fieruloj sed al humiluloj donas gracon. 3 Ni do ligiĝu al tiuj, al kiuj estas donata la graco de Dio: ni vestu nin en la konkordo, humilmensaj kaj ĉastaj, longe tenante nin for de kalumnio kaj klaĉado, justigitaj per faroj kaj ne per diroj. 4 Ĉar estis dirite: Tiu, kiu multe diras, ankaŭ multe siavice aŭskultu; aŭ ĉu tiu, kiu bele parolas, kredas esti prava? 5 Benata la virinido kiu vivas mallonge. Ne tro longiĝu en paroloj⁵³.

⁵⁰ Psalmo 139:7-10.

⁵¹ Readmono 32:8-9, laŭ LXX.

⁵² Nekonata cito.

⁵³ Cito ne klara.

6 Nia laŭdo venu de Dio kaj ne el ni mem; ĉar Dio malamas tiujn, kiuj sin laŭdas. 7 Atesto pri nia bona agado estu donata de aliaj, kiel estis donita pri la justaj praavoj. 8 Senhonto kaj aroganteco kaj trokuraĝo estas por tiuj, kiujn forlasis Dio; sed bonvolemo, humilo kaj mildeco por tiuj, kiujn benas Dio.

La vojoj de Lia beno

31:1 Ni do ligiĝu al Lia beno, kaj ni rigardu, kiuj estas la vojoj de la beno. Ni pristudu la okazaĵojn dekomence. 2 Pro kio estis benata nia patro Abraham, ĉu ne ĉar justecon kaj veron li faris per la fido? 3 Isaak konfide sciis, kio okazos, kaj libervole estis kondukata kiel ofero. 4 Jakob elmigris kun humileco el sia lando pro sia frato, kaj li iris al Laban kaj estis sklavo, kaj estis donata al li la dekduopa sceptro de Izrael.

Justigo en la fido je Jesuo Kristo

32:1 Se iu konsiderus ilin unuope sincere, tiu komprenus la grandecon de la donoj, kiujn ili ricevis. 2 Ĉar el li devenas ĉiuj pastroj kaj levidoj, kiuj oficas ĉe la altaro de Dio; de li devenas la Sinjoro Jesuo laŭ la karno; de li la reĝoj, regantoj kaj gvidantoj laŭ Jehuda; ankaŭ la ceteraj sceptroj de liaj triboj ne estas en malgranda honoro, ĉar Dio promesis: Via semo estos kiel la steloj de la ĉielo.

3 Ĉiuj do estis honorataj kaj grandigitaj, ne de si mem kaj de propraj faroj aŭ de la justeco, kiun ili faris, sed de Lia volo.

4 Kaj tiel ankaŭ ni, vokitaj de Lia volo en Kristo Jesuo, ne estas justigitaj de ni mem nek de nia saĝeco, kompreno, pieco aŭ agoj, kiujn ni faris en sankteco de la koro, sed per la fido, per kiu de eterneco justigis ĉiujn homojn la Ĉiopova Dio. Al Li estu la gloro por eterna eterneco. Amen.

La justigo per la fido ne kontraŭas bonajn agojn

33:1 Kion do ni faru, fratoj? Ĉu senfare ni restu antaŭ la bono kaj retenu nin de la agoj de amo? Neniam la Sinjoro permesu, ke tio okazu al ni, sed ni rapidu sindediĉe kaj volonte plenumi ĉiajn bonajn agojn! 2 Ĉar la

Kreinto kaj Sinjoro de la universo ĝojas pri Siaj faroj. 3 Ĉar per Sia ekstreme granda potenco Li fiksis la ĉielojn, kaj per Sia nekomprenebla saĝeco Li ordigis ilin; Li apartigis la teron de la akvo, kiu ĝin ĉirkaŭas kaj Li stabiligis ĝin sur la firma fundamento de Sia volo; la vivulaĵojn, kiuj iras sur ĝi, per Sia ordono Li igis esti. Antaŭe Li kreis la maron kaj la bestojn en ĝi, kaj per Sia potenco Li limigis ĝian lokon. 4 Super ĉiuj ĉi estaĵoj kiel stampon de Sia bildo per Siaj sanktaj kaj seneraraj manoj Li formis la plej eminentan kaj plej grandan kreaĵon, la homon. 5 Tiel ja diras Dio: *Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj Dio kreis la homon, vira kaj virina Li kreis ilin*⁵⁴. 6 Fininte do ĉion ĉi, Li laŭdis ilin kaj benis, kaj diris: *Frukto kaj multiĝu*⁵⁵. 7 Ni vidis, kiel ĉiuj justuloj estis ornamitaj per bonaj agoj, kaj ankaŭ la Sinjoro mem ĝojis, ornamante Sin per ili. 8 Ĉar ni do havas tiun modelon, senhezite ni konformiĝu al Lia volo, el tuta nia forto ni plenumu agojn de justeco.

Espero je premio, motivo por fervoro

34:1 La bona laboristo kuraĝe ekprenas la panon por sia laboro, sed la pigra kaj neglektema ne levas la okulojn al sia dunganto. 2 Necesas do, ke ni ardege faru la bonon, ĉar de Li estas ĉiuj estaĵoj. 3 Li ja avertis nin: *Jen la Sinjoro, jen Lia rekompenco estas kun Li, kaj Lia repago antaŭ Li*⁵⁶. 4 Li admonas nin, ke ni fidu je Li per la tuta koro, ne neglekteme nek senzorge pri ĉiuj bonaj faroj. 5 Nia glorado kaj nia fiero estu ĉe Li: ni submetiĝu al Lia volo; ni atentu pri la tuta amaso de Liaj anĝeloj, kiel ili staras ĉe Li por sia servado. 6 Ĉar diras la Skribo: *Miloj da miloj servis al Li, kaj dekmiloj da dekmiloj staris antaŭ Li, kaj vokadis: Sankta, sankta, sankta estas la Sinjoro Cebaot; la tuta tero estas plena de Lia gloro*⁵⁷. 7 Ankaŭ ni do, konkorde kunigite konsciaj pri nia devo, kvazaŭ unuvoĉe serioze voku al Li, ke ni estu partoprenantoj de Liaj grandaj kaj gloraj promesoj. 8 Ĉar Li

⁵⁴ Genezo 1:26-27.

⁵⁵ Genezo 1:28.

⁵⁶ Jesaja 40:10.

⁵⁷ Daniel 7:10; Jesaja 6:3.

diras: *Kion oni ne aŭdis, nek eksciis per la orelo, nek okulo tion vidis, nek leviĝis en koron de homo, kion Li preparis por tiuj, kiuj esperas je Li*⁵⁸.

Ni meritu la donojn de Dio

35:1 Kiel feliĉaj kaj admirindaj estas la donoj de Dio, ho plej karaj! 2 Vivo en senmorto, brilo en justeco, vero en nekaŝemo, fido en konfido, sinregado en sanktigo: kaj ĉio ĉi sub nia kompreno. 3 Kio do estas preparata por tiuj, kiuj atendas? La Kreinto kaj Patro de la eterneco, la Absolute Sankta, nur Li scias, kiom estas kaj kia estas ilia belo. 4 Ni do luktu, por ke ni troviĝu inter tiuj, kiuj pacience atendas Lin, por ke ni ricevu la donacojn promesitajn.

5 Sed, miaj karaj, kiel do tio efektiviĝos?

Se nia menso en fido fiksiĝis je Dio, se ni serĉas tion, kio estas agrabla kaj akceptebla al Li, se ni plenumas tiujn aferojn, kiuj decas al Lia neriproĉebla volo, kaj sekvas la vojon de la vero, forĵetante de ni ĉiun maljuston, kalumniojn, klaĉojn, kverelojn, malicojn, ruzojn, flustrojn, malamatecon ĉe Dio, arogantecon, fieron, vantecon kaj malamon je fremduloj. 6 Ĉar kiuj tion faras, tiuj estas abomenaj al Dio; sed ne nur kiuj tion faras, sed ankaŭ tiuj, kiuj konsentas kun ili. 7 Ĉar la Skribo diras: *Al la pekanto diras Dio: Kial vi recitas Miajn preceptojn, kaj prenas Mian interligon sur viaj lipoj?* 8 *Sed vi malamas instruojn kaj forĵetis Miajn vortojn malantaŭ vi. Se ŝteliston vi rimarkis, vi forkuris kun li, kaj ĉe la adultuloj vi metis vian porcion. Via buŝo multobligis malbonon, kaj via lango planis trompaĵojn. Kunsidante kontraŭ via frato, vi kalumniis, kaj kontraŭ la filo de via patrino vi metis faligoŝtonon.* 9 *Tion vi faris, kaj Mi silentis; vi pensis, malpiulo, ke Mi estas simila al vi.* 10 *Mi konviktos vin, kaj Mi konfrontos vin kun via propra vizaĝo.* 11 *Ĉion ĉi vi nun konsciu, vi kiu forĝesis pri Dio! Alie Li kaptos vin kiel leono, kaj neniu povos savi vin.* 12 *Laŭdofero Min gloros, kaj tio estas la vojo, laŭ kiu Mi montros al li la saviĝon ĉe Dio*⁵⁹.

⁵⁸ Laŭ Jesaja 64:4.

⁵⁹ Cito nekonata.

Jesuo Kristo, la vojo de nia saviĝo

36:1 Tio estas la vojo, miaj karaj, laŭ kiu ni trovis nian saviĝon: Jesuo Kristo, la ĉefpastro de niaj oferoj, la patrono kaj helpanto de nia malforto. 2 Per li ni fikse rigardas la altaĵon de la ĉieloj; per li ni kontemplas kvazaŭ en spegulo lian senmakulan kaj suverenan vizaĝon; per li la okuloj de nia koro malfermiĝis; per li nia stulta kaj obskurigita menso eksaltas al la lumo; per li la Sinjoro volas, ke ni gustumu el la senmorta scio, kiu estante elbrilo de Lia gloro, tiom pli granda estas ol la anĝeloj, kiom pli bonegan nomon ol ili li heredis⁶⁰.

3 Ĉar tiel estas skribite pri li: *Kiu faras la ventojn liaj senditoj, flamantan fajron liaj servantoj*⁶¹. 4 Sed pri Sia filo la Sinjoro diras jene *Vi estas Mia filo, hodiaŭ Mi vin naskis. Petu Min, kaj Mi donos al vi popolojn por heredo, kaj por posedo limojn de la tero*⁶². 5 Kaj plu Li diras al li: *Sidu dekstre de Mi, ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj*⁶³. 6 Kiu do estas tiuj malamikoj? La malbonuloj kaj tiuj, kiuj kontraŭas lian volon.

Milita disciplino kaj la harmonio de la homa korpo – modeloj por la kristano

37:1 Ni do soldatservu, viroj-fratoj, kun ĉiu seriozo sub liaj seneraraj ordonoj. 2 Ni konsideru la soldatojn, kiuj enlistiĝis sub niaj gvidantoj, per kia ordo, per kia obeemo, per kia submetiĝo ili plenumas la taskojn. 3 Ne ĉiuj estas generaloj nek milestroj nek centestroj nek kvindekestroj ktp, sed ĉiu en sia propra vico plenumas la ordonojn de la reĝo kaj la gvidantoj. 4 La grandaj ne povas ekzisti sen la malgrandaj, nek la malgrandaj sen la grandaj; en ĉio estas ia miksiĝo, kaj en tio estas utilo.

5 Ni prenu nian korpon kiel ekzemplon: la kapo sen la piedoj estas nenio, tiel same la piedoj sen la korpo; eĉ la plej etaj membroj de nia korpo estas necesaj kaj utilaj por la tuto de la korpo; evidente, ĉiuj

⁶⁰ Hebreoj 1:3-4.

⁶¹ Psalmo 10 4:4.

⁶² Psalmo 2:7-8.

⁶³ Psalmo 110 :1.

konsentas en reciproka dependeco kaj submetiĝo, por ke la tuta korpo vivu.

Ankaŭ ni estas unu korpo en Kristo

38:1 Tiel nia tuta korpo do estu sana en Kristo Jesuo, kaj ĉiu homo submetiĝu al sia najbaro, konforme al la graco ricevita. 2 La forta prizorgu la malfortan, kaj la malforta respektu la fortan. La riĉa subtenu la malriĉan; kaj la malriĉa danku al Dio, ĉar Tiu donis al li iun, per kiu liaj bezonoj estu satigitaj. La saĝulo montru sian saĝecon, ne per vortoj, sed per bonaj agoj. La humilulo ne atestu pri si mem, sed lasu, ke lia najbaro atestu pri li. La ĉastulo en la karno ne fieru pri tio, sed rekonu, ke estas Alia, kiu donis al li la ĉastecon.

3 Ni konsciu, fratoj, el kiu materio ni estis kreitaj: kiaj kaj kio ni estis, kiam ni naskiĝis en ĉi mondon; el kiu obskura tombo nia Farinto kaj Kreinto nin enkondukis en ĉi Lian mondon. Siajn bonfarojn Li tenis pretaj antaŭ ol ni estis kreitaj. 4 Ĉar ĉion ni ricevis de Li, ni devas danki Lin. Al Li estu la gloro por eterna eterneco. Amen.

39 :1 Sensciuloj kaj nekomprenantoj, stultuloj kaj needukitoj mokas kaj rikanas pri ni, esperante, ke ili mem altiĝas en sia imago. 2 Ĉar kion kapablas mortemulo? kiun forton havas homo pereema? 3 Estas ja skribite: *Ne staris bildo antaŭ miaj okuloj, sed nur spiron kaj voĉon mi perceptis.* 4 Kio do? Ĉu homo estas justa antaŭ la Sinjoro? Ĉu viro estas perfekta en siaj agoj? Eĉ Siajn servistojn Li ne povas fidi, kaj ĉe Siaj anĝeloj Li konstatis ion mallaŭdindan. 5 La ĉielo ne estas pura antaŭ Li. Fi do, vi kiuj loĝas en argilaj dometoj, al kiuj apartenas ankaŭ ni, kiuj estas faritaj el la sama argilo. Li frapis ilin kiel tineidon, kaj de mateno ĝis vespero ili ne plu estas; ĉar ili ne povis helpi sin mem, ili pereis. 6 Li blovis al ili, kaj ili mortis, ĉar ili ne havis saĝecon. 7 Voku do, ĉu iu volas aŭskulti vin, aŭ ĉu iun el la sanktaj anĝeloj vi vidas; ĉar kolero mortigas la malsaĝulon, kaj sensenculon pereigas la incitiĝemo. 8 Mi vidis malsaĝulojn, kiuj enradikiĝis; sed ilia manĝaĵo subite estis glutita. 9 Malproksimaj de savo estos iliaj filoj; ili estos mokataj ĉe la

*pordoj de la malfortuloj. Kaj ne estos iu, kiu ilin savos; kio por ili estis preparita, tion la justuloj manĝos; sed el sia malbono ili ne estos savitaj*⁶⁴.

Hierarkio kaj ordo en la malnova Leĝo, simbolo por la nova hierarkio

40 :1 Ĉar ĉio ĉi por ni estas plene klara, kaj ni rigardis en la profundon de la scio de Dio, necesas, ke ĉion ni faru laŭvice, kion ordonis la Sinjoro fari laŭ fiksitaj tempoj. 2 Oferojn kaj servojn Li ordonis, sed ne senplane kaj sisteme, sed je fiksitaj tempoj kaj momentoj. 3 Kaj kie kaj de kiuj Li volas, ke ili plenumiĝu, Li mem fiksis per Sia plejalta volo, por ke sankte ĉio okazu laŭ Lia plaĉo kaj estu agrabla al Lia volo. 4 Kiuj plenumas la indikitajn oferojn je la fiksitaj horoj, estas akceptataj kaj benataj; ĉar ili sekvas la instruojn de la Sinjoro, ili ne povas erari. 5 Ĉar al la ĉefpastro estis donitaj liaj taskoj, kaj al la pastroj ilia propra ofico, kaj al la levidoj iliaj propraj servoj. La laikoj ricevis la taskojn de laikoj.

Ĉiu en la propra loko

41:1 Ĉiu el vi, fratoj, en sia propra loko danku al Dio, kun bona konscienco. Ĉe tio en sankteco li ne transpaŝu la fiksitajn regulojn por lia servo. 2 Ne ĉiuloke, fratoj, estas prezentataj la ĉiutagaj dankoferoj, la pekoferoj, la kulpoferoj, sed nur en Jerusalemo. Sed eĉ tie ne ĉiuloke, sed antaŭ la templo sur altaro, post kiam la oferotaĵon inspektis je mankoj la ĉefpastro kaj la menciitaj servantoj. 3 Kiuj faras ion, kio estas kontraŭ Lia volo, kiel punon ricevas la morton. 4 Vidu do, fratoj: ju pli granda estas la scio, je kiu Li taskis nin indajn, des pli da danĝeroj ni riskas.

Dia origino de la kristana hierarkio: Dio – Kristo – apostoloj

42:1 La apostoloj ricevis por ni la evangelion de la Sinjoro Jesuo Kristo; Jesuo Kristo estis elsendita de Dio. 2 Kristo do venas de Dio, la apostoloj de Kristo; sed ambaŭ laŭorde venis el la volo de Dio. 3 Ricevinte do ĉi taskon kaj plene certigitaj de la resurekto de nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj konfirmitaj en la fido per la vorto de Dio, plenigitaj de la sankta Spirito

⁶⁴ Ijob 4:16-5. Laŭ LXX.

ili ekiris kun la evangelio, ke venos la Regno de Dio. 4 Tra regionoj kaj urboj predikante, ili starigis siajn unuaĵojn, kiam tiujn ili traserĉis en spirito, por esti episkopoj kaj diakonoj pri tiuj, kiuj ekfidis. 5 Kaj tio ne estis io nova, ĉar jam antaŭ longe estis skribite pri episkopoj kaj diakonoj. Ĉar tiel ie diras la Skribo: *Mi starigos iliajn episkopojn en justeco kaj iliajn diakonojn en fido*⁶⁵.

La ekzemplo de Moseo

43:1 Kaj ĉu estas mirige, ke tiuj, al kiuj tia laboro en Kristo estis konfidita de Dio, starigis la menciitojn? Ĉar ankaŭ la beata Moseo, la fidela servisto en tuta lia domo, notis ĉion al li ordonitan de Li en la sanktaj libroj. Kaj lin sekvis ĉiuj ceteraj profetoj, atestante pri ĉio, kion li leĝigis. 2 Ĉar, kiam estiĝis ĵaluzo pri la pastreco kaj kiam ribelis la triboj pri tio, kiu el ili estu ornamita per la plej glora Nomo, li ordonis al la dek du tribestroj transdoni al li la bastonojn kun sur ili la nomoj de ĉiu unuopa tribo. Tiujn li akceptis, kunligis, kaj sigelis per la ringoj de la tribestroj, kaj formetis ilin en la tabernaklon de la atesto sur la tablon de la Sinjoro. 3 Li fermis la tendon, sigelis la ringojn kaj la bastonojn. 4 Kaj li diris al ili: Viroj-fratoj, de kiu tribo burĝonos la bastono, tiun elektis Dio por esti pastroj kaj por servi al Li. 5 Kiam do venis la mateno, la tutan Izraelon li kunvokis, la sescent mil homojn, montris la sigelojn al la tribestroj, malfermis la tabernaklon de la atesto kaj elprenis la bastonojn. Kaj troviĝis, ke la bastono de Aaron ne nur ekĝermis, sed eĉ jam fruktis. 6 Kion vi pensas, karuloj? Ĉu Moseo ne anticipis jam sciis, ke tio okazos? Certe li jam antaŭsciis, sed por ke en Izrael ne okazu tumulto, li tiel agis, por glorigi la nomon de la vera kaj sola Dio, al Kiu estas la gloro por eterna eterneco. Amen.

La grava peko de la ribelaj Korintanoj

44:1 Ankaŭ niaj apostoloj sciis per nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke estos kvereloj pri la episkopa funkcio. 2 Tial do ili enoficigis la menciitojn, ĉar ili ricevis plenan scion pri la estonto. Kaj poste ili starigis la regulon, ke,

⁶⁵ Jesaja 60:17 LXX.

kiam tiuj mortos, aliaj elprovitaj viroj transprenu ilian servadon. 3 Tiujn do, kiujn starigis ili, aŭ kiujn post ili starigis aliaj elstaraj homoj, kun konsento de la tuta eklezio: homojn, kiuj sian taskon plenumis senriproĉe pri la grego de Kristo en spirito humila, paceme kaj senegoisme; pri kiuj dum longa tempo multaj bone atestis: tiujn ni opinias maljuste elĵetitaj el ilia servado. 4 Ĉar estus por ni ne leĝera peko, se tiujn ni forĵetos el la episkopeco tiujn, kiuj senriproĉe kaj sankte faris la oferojn. 5 Feliĉaj estas la pliaĝuloj, kiuj antaŭiris ilin, kaj kiuj mortis kun riĉa frukto kaj perfektaj, ĉar ili ne devas timi, ke iu forigos ilin el la loko kiun ili okupas. 6 Ĉar ni vidis, ke vi forigis el ilia servado kelkajn <virojn>, kiuj honorplene kaj kun laŭdo ĝin plenumis.

La justuloj estas persekutataj

45:1 Obstinaj vi estas, fratoj, kaj ĵaluzaj pri la aferoj, kiuj temas pri la saviĝo. 2 Vi traserĉadis la Sanktajn Skribojn – la verajn – tiujn, kiuj venis tra la sankta Spirito, 3 kaj vi scias, ke nenio maljusta aŭ falsa estas skribita en ili. Vi ne trovos, ke justuloj estis elĵetitaj de sanktaj viroj. 4 Persekutataj estis justuloj, sed ja de senleĝuloj; ili estis enprizonigitaj, sed de malpiuloj; ili estis ŝtonumitaj, sed de krimuloj; ili estis mortigitaj, sed de homoj, kiujn obsedis turpa kaj maljusta ĵaluzo. 5 Suferante tiajn aferojn, ili noble eltenis. 6 Ĉar kion ni diru, fratoj? Ĉu Daniel estis metita en la leonan kavon de homoj, kiuj timis antaŭ Dio? 7 Aŭ ĉu Ĥananja, Azarja kaj Miŝael estis enfermitaj en la fornon de fajro de homoj, kiuj praktikis la admiran kaj gloran kultron de la Plejaltulo? Absolute ne! Kiuj do faris tion? Abomenaj homoj, plenaj je ĉia malico, kiuj tiom ekflamis de kolero, ke al tiu kruela sufero ili transdonis homojn, kiuj sankte kaj senkulpe servis al Dio, sen scii, ke la Plejaltulo estas la probatalanto kaj protektanto de tiuj, kiuj kun pura konscienco servas al Lia elstrara Nomo. Al Li estu la gloro por eterna eterneco. Amen.

8 Sed kiuj en la fido eltenis, ricevis gloron kaj honoron; ili estis altigitaj, kaj notitaj de Dio por resti en Lia memoro por eterna eterneco. Amen.

Unu Dio, unu Kristo, unu Spirito

46:1 Tiajn ekzemplojn, fratoj, ni strikte sekvu. 2 Ĉar estas skribite: Tenu vin je la sanktuloj, ĉar kiuj tion faras, estos sanktigitaj⁶⁶. 3 Aliloke estas dirite: *Kun piulo vi estas pia, kun purulo vi agas laŭ lia pureco, sed kun maliculo laŭ lia malico*⁶⁷. 4 Ni tenu nin do je la piuloj kaj la puruloj, ĉar tiuj estas la elektitoj de Dio. 5 Kial estas kvereloj, koleroj, disputoj, disiĝoj kaj militoj inter vi? 6 Ĉu ni ne havas unu Dion, unu Kriston, unu Spiriton de graco disŝutitan sur nin? Kaj ĉu ne estas unu vokiĝo en Kristo? 7 Kial ni do disŝiras kaj disrabas la membrojn de Kristo kaj rezistas kontraŭ nia propra korpo, kaj kial ni venis al tia frenezo, ke ni forgesas, ke ni estas membroj unuj de la aliaj? Memoru la parolojn de nia Sinjoro Jesuo. 8 Li diris ja: *Ve al tiu viro; estus bone por li, se li ne estus naskita; estus pli bone por li, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus ĵetita en la maron, ol ke li metus falilon por unu el ĉi miaj elektitoj*⁶⁸. 9 Via dividiteco delogis multajn, multajn ĝi senkuraĝigis, multajn igis dubi, kaj nin ĉiujn kondukis en ĉagrenon; kaj via rezistado plu daŭras.

Memorigo pri Paŭlo

47:1 Prenu en la manojn la leteron de la beata apostolo Paŭlo. 2 Kion li skribis al vi komence de la evangelio⁶⁹? 3 Vere li skribis en la Spirito pri si mem, pri Kefas kaj Apolos, ĉar ankaŭ tiam vi faris partiojn. 4 Sed tiu dispartiiĝo alportis al vi malpli da peko, ĉar vi turnis vin al la apostoloj atestitaj de Dio kaj al viro, aprobita de ili. 5 Sed nun vi atentu, kiuj devojigis vin kaj malpliigis la gloron de via konata fratamo. 6 Hontige, karaj, ja hontige estas kaj malinde je kristana konduto, aŭdi, ke la plej establita kaj malnova eklezio de la Korintanoj pro unu aŭ du personoj ekribelis kontraŭ la pliaĝuloj. 7 Kaj tiu sciigo atingis ne nur nin, sed ankaŭ homojn ekster nia fido, tiel ke dank' al via malsaĝeco okazis

⁶⁶ Nekonata cito.

⁶⁷ Psalmo 18:26-27.

⁶⁸ Mateo 26:24; 18:6-7; Marko 9:42; Luko 17:1-2.

⁶⁹ 1 Korintanoj 2,4.10.12-15.

ofendo al la nomo de la Sinjoro, sed krome vin mem vi metis en danĝeron.

Jesuo Kristo, pordo de la justeco

48:1 Ni do elradikigu tion plej rapide, kaj ni ĵetu nin vizaĝalteren antaŭ la Sinjoro, kaj plorante petegu Lin, ke indulge Li repaciĝu kun ni kaj restaŭru nin en la sankta kaj pura konduto de fratameco. 2 Ĉar tio estas la pordo de justeco malferma al la vivo, kiel estas skribite: *Malfermu al mi la pordegojn de la justeco; mi iros tra ili, mi gloros la Sinjoron.* 3 Jen estas la pordego de la Sinjoro; virtuloj iras tra ĝi⁷⁰. 4 Malfermaj estas multaj pordoj, sed tiu de justeco estas tiu en Kristo. Feliĉaj ĉiuj, kiuj eniras tra ĝi kaj iras sian vojon en sankteco kaj justeco, kaj senkonfuzo ĉion plenumas. 5 Iu estu fidulo, iu estu kapabla dividi la scion, iu estu saĝulo en distingado de paroloj, iu estu sankta en agoj. 6 Ju pli granda li aspektas, des pli modesta li estu, kaj li serĉu la komunan bonon, ne tiun de si mem.

Plej gravas la amo

49 :1 Kiu havas amon en Kristo, plenumu la ordonojn de Kristo. 2 Kiu povas klarigi la aman ligon de Dio? 3 Kiu povas eldiri la majeston de lia beleco? 4 La alteco, kien kondukas la amo, estas nedirebla. 5 Amo nin ligas al Dio: *Amo kovras ĉiujn pekojn*⁷¹. Amo ĉion eltenas, en ĉio paciencas; en amo nenio estas malnobla, nenio trofiera; amo ne konas ŝiriĝon, amo ne kverelas, amo ĉion faras en harmonio: en la amo ĉiuj elektitoj de Dio fariĝas perfektaj, sen amo nenio plaĉas al Dio. 6 En amo la Sinjoro nin prenis al si; per la amo, kiun li havis por ni, la Sinjoro Jesuo Kristo donis sian sangon pro ni, laŭ la volo de Dio, kaj sian karnon pro nia karno, kaj sian animon pro nia animo.

50 :1 Vi vidas, miaj karaj, kiel granda kaj mirinda estas la amo, kaj ke ne eblas klarigi ĝin komplete. 2 Kiu povas troviĝi en ĝi, krom tiu, kiun Dio mem juĝis inda? Tial do ni petu kaj demandu, ke ni troviĝu en Lia amo, for de homa partiemeco, kaj senriproĉe. 3 Ĉiuj generacioj de Adam ĝis la

⁷⁰ Psalmo 118:19 -20.

⁷¹ Sentencoj 10 :12.

nuna tago forpasis, sed kiuj en amo estas perfektaj laŭ la graco de Dio, havas lokon ĉe la piuloj; kaj ili manifestiĝos ĉe la apero de la Regno de Kristo. 4 Ĉar estas skribite: *Eniru en viajn ĉambrojn por mallonga momento, ĝis pasos Miaj furiozo kaj kolero; kaj Mi memoros la bonan tagon, kaj elirigos vin el viaj tomboj*⁷². 5 Feliĉaj ni estas, miaj karaj, se la ordonojn de Dio ni faras en konkordo de amo, por ke per amo estu pardonitaj niaj pekoj. 6 Ĉar estas skribite: *Feliĉa estas tiu, kies krimo estas pardonita, kies peko estas kovrita. Feliĉa estas la homo, al kiu la Sinjoro ne kalkulas lian kulpon, en kies buŝo ne estas ruzo*⁷³. 7 Tiu deklaro de feliĉeco okazis pro la elektitoj de Dio tra nia Sinjoro Jesuo Kristo, al kiu estu la gloro por eterna eterneco. Amen.

Alvoko al pentemo

51:1 Pri ĉio, kion ni misfaris aŭ kulpas pro la embuskoj de la kontraŭulo, ni petegu, ke estu pardonite al ni; sed ankaŭ tiuj, kiuj instigis al ribelado kaj skismo, devas prikonsideri, kion komunan ni havas en la espero. 2 Ĉar kiuj direktas sian vivon en timo kaj amo, preferas, ke ili mem trafu sub suferoj ol iliaj proksimuloj: ili prefere lasas kondamni sin mem ol la harmonion, tiel bele kaj juste transdonitan al ni. 3 Ĉar estas bone por la homo konfesi siajn kulpojn pli ol durigi sian koron, kiel malmoliĝis la koro de tiuj, kiuj ribelis kontraŭ Moseo, la servisto de Dio, kaj kies kondamno fariĝis evidenta. 4 Ĉar ili vivaj malsupreniris en Hadeson, kaj la morto ilin paŝtos⁷⁴. 5 Faraono, lia armeo kaj ĉiuj estroj de Egiptujo, la batalĉaroj kaj iliaj rajdistoj mergiĝis en la Ruĝan Maron kaj pereis pro neniu alia kialo ol ke siajn stultajn korojn ili malmoligis post la signoj kaj mirindaĵoj, estigitaj en Egiptujo de la servisto de Dio, Moseo.

Konfeso de la pekoj – ofero, kiun aprezas Dio

52:1 La Sinjoro de la universo, fratoj, absolute nenion bezonas: nenion de iu ajn Li petas, nur ke li konfesu <siajn pekojn>. 2 Lia elektito David ja

⁷² Jesaja 26:20.

⁷³ Psalmo 32:1-2.

⁷⁴ Nombroj 16:30; Psalmo 49:14.

diras: *Mi konfesos la Sinjoron, kaj tio estos al Li pli agrabla ol bovo aŭ bovido kun kornoj kaj fendohavaj hufoj: vidu ĝin humiluloj kaj ĝoju*⁷⁵! 3 Aliloke li diras: *Oferdonu al Dio dankon, kaj plenumu antaŭ la Plejaltulo viajn promesojn. Voku Min en la tago de mizero, Mi vin liberigos, kaj vi Min gloros*⁷⁶. 4 *Ĉar oferdonu al Dio estas spirito suferanta*⁷⁷.

La ekzemplo de Moseo

53:1 *Ĉar vi konas, jes vi bone konas, karuloj, la Sanktajn Skribojn, vi ja serĉis en la diroj de Dio. Ni ja skribas por memorigi tion al vi. 2 Kiam Moseo suriris la monton kaj kvardek tagojn kaj kvardek noktojn tie restis en fastado kaj humileco, Dio diris al li: Haste iru malsupren, ĉar via popolo, kiun vi elkondukis el la lando Egipta, malvirtigis: ili rapide forflankiĝis de la vojo, kiun Mi ordonis al ili, kaj ili faris al si fanditajn idolojn*⁷⁸. 3 Kaj la Sinjoro diris al li: *Mi parolis al vi unu fojon kaj duan fojon: Mi vidis tiun popolon, kaj jen ĝi estas popolo malmolnuka. Lasu do Min kaj ekflamos Mia kolero kontraŭ ili, kaj Mi ekstermos ilin, kaj ilian nomon Mi forigos el sub la ĉielo, kaj Mi faros vin granda kaj mirinda popolo, multe pli bona ol ĉi tiu*⁷⁹. 4 Kaj Moseo diris: *Ho ne, Sinjoro; volu pardoni al tiu popolo ilian pekon; kaj se ne, tiam volu forstreki min el Via libro de la vivantoj*⁸⁰. 5 Ho granda amo! Ho perfekteco nesuperebla! La servisto senĝene parolas antaŭ la Sinjoro, li petas pardonon por la popolo, aŭ li petas, ke li mem estu forigita kune kun ili.

Konsilo al la ribelantoj

54:1 Kiu el vi do estas nobla? Kiu kompatema? Kiu plena je amo? 2 Li tion diru. Se pro mi estus ribelado aŭ malpaco auz skismo, mi forirus, retiriĝus, kien ajn vi dezirus, kaj mi faros kion ajn ordonos la popolo. Se nur la gregoj de Kristo estu en paco kun la estigitaj pliaĝuloj. 3 Kiu tion

⁷⁵ Psalmo 69:30 -32.

⁷⁶ Psalmo 50:14-15.

⁷⁷ Psalmo 51:17.

⁷⁸ Eliro 32:7-8.

⁷⁹ Eliro 32:9 -11.

⁸⁰ Eliro 32:32.

faras, ekhavos al si grandan famon en Kristo, kaj ĉiu loko ricevos lin. *Ĉar al la Sinjoro apartenas la tero, kaj ĉio, kio ĝin plenigas*⁸¹. 4 Tiel agis kaj agos tiuj, kiuj estas civitanoj de la Regno de Dio, pri kio oni ne pentos.

Ekzemploj ankaŭ de gojoj, kiuj oferis sin por la ceteraj

55:1 Sed por ankaŭ doni ekzemplojn de gojoj: multaj reĝoj kaj estroj, en tempo de pesto, pro diro de orakolo sinmortigis por per sia sango savi la civitanojn. Multaj formigris el siaj propraj urboj, por ke ne plu estu ribelado. 2 Ni scias pri multaj inter ni, kiuj fordonis sin al katenoj, por liberigi la ceterajn; multaj transdonis sin al sklaveco, kaj per la prezo, kiun ili ricevis por si, la ceterajn ili povis nutri. 3 Multaj virinoj, fortikigitaj de la graco de Dio, plenumis multajn heroaĵojn. 4 La sankta Judit⁸², dum la urbo estis sieĝata, petis la pliaĝulojn de la urbo, ke ili lasu ŝin eliri al la kampadejo de la fremduloj. 5 Tiel ŝi transdonis sin al danĝero kaj eliris pro amo al la patrujo kaj de sia popolo, kiuj estis sieĝataj, kaj la Sinjoro transdonis Holofernon en la manon de virino. 6 Al ne malpli da danĝero elmetis sin Ester, perfekta en la fido, por savi la dekdutribaron de Izrael, kiu riskis neniigi. Ĉar per sia fastado kaj sia humileco ŝi petegis la Sinjoron, kiu ĉion vidas, la Dion de la Eterneco, kaj Li, vidante la humilon de ŝia animo, liberigis la popolon, pro kiu ŝi estis en danĝero.

Laŭdo de la frata interkorektado

56:1 Tial do ankaŭ ni preĝu por tiuj, kiuj estas en pekoj, por ke modesto kaj humilo estu donitaj al ili, tiel ke ili cedu ne al ni, sed al la volo de Dio; ĉar tiel por ili estos fruktive kaj kondukos al perfekteco, se en kompatemo ni memoros pri ili antaŭ Dio kaj la sanktuloj. 2 Ni akceptu admonadon, fratoj, kontraŭ kiu neniu protestu. La admonoj, kiujn reciproke ni donas inter ni, estas bonaj kaj tre utilaj; ili ja ligas nin al la volo de Dio. 3 Ĉar tiel diras la sankta diro: *Per forta puno punadis min la*

⁸¹ Psalmo 24:1.

⁸² Vidu en *La Duakanonaj Libroj*.

*Sinjoro, sed al la morto Li min ne donis*⁸³. 4 *Ĉar kiun la Sinjoro amas, tiun Li punkorektas, kaj Li skurgas ĉiun filon, kiun Li akceptas*⁸⁴. 5 *La justulo min frapos favorkore, li diras, kaj punos min; sed oleo de pekuloj ne ŝmiru mian kapon*⁸⁵. 6 *Kaj ankaŭ estis dirite: Feliĉa estas la homo, kiun punas la Sinjoro; kaj la moralinstruon de la Plejpotenculo ne malŝatu, ĉar Li vundas, sed ankaŭ bandaĝas; 7 Li batas, sed Liaj manoj ankaŭ resanigas. 8 En ses malfeliĉoj Li vin savos; en la sepa ne tuŝos vin la malbono. 9 En tempo de malsato Li savos vin de la morto, kaj en milito el la mano de glavo. 10 Kontraŭ la vipo de lango Li vin kaŝos, kaj vi ne timos ruinigon, kiam ĝi venos. 11 Dum ruinigo kaj malsato vi ridos, kaj la bestojn de la tero vi ne timos. 12 Ĉar la bestoj de la kampo havos pacon kun vi. 13 Tiam vi ekscios, ke paco estas en via tendo; vi esploros vian loĝejon, kaj nenio mankos. 14 Kaj vi ekscios, ke grandnombra estas via idaro kaj via naskitaro estas kiel la herbo de la tero. 15 Kiel matura greno, kiu rikoltiĝis ĝustatempe, vi iros en la tombon, aŭ kiel garbaro sur la draŝejo, en sia tempo amasigita*⁸⁶. 16 *Vi do vidas, karaj, kiel estas protektataj tiuj, kiujn punkorektas la Sinjoro, ĉar kiel bona patro Li punas nin, por ke per tio ni atingu Lian kompaton.*

Alvoko al la ribelintoj

57:1 Tial vi, kiuj komencis la ribeladon, submetiĝu al la pliaĝuloj kaj penteme lasu vin punkorekti. Fleksu la genuojn de via koro. 2 Lernu submetiĝi, flankenmetante la arogan kaj fieran obstinon de via lango; estas ja por vi pli bone, aperi malgrandaj sed menciindaj en la grego de Kristo ol esti tro honorataj kaj tamen esti elpelitaj el lia espero. 3 Ĉar jene diris la eminenta Saĝeco: *Jen mi eligos al vi mian spiriton, mi sciigos al vi miajn vortojn.* 4 *Ĉar mi vokis, kaj vi rifuzis; mi etendis mian manon, kaj neniu atentis; kaj vi forĵetis ĉiujn miajn konsilojn, kaj miajn predikojn vi ne deziris: tial ankaŭ mi ridos ĉe via malfeliĉo, mi mokos, kiam timo vin atakos. Kiam la timo atakos vin kiel uragano, kaj via malfeliĉo venos kiel ventego, kiam venos al vi mizero kaj sufero: 5 tiam ili min vokos, sed mi ne respondos; ili min serĉos,*

⁸³ Psalmo 118:18.

⁸⁴ Sentencoj 3:12; Hebreoj 12:6.

⁸⁵ Psalmo 141:5.

⁸⁶ Ijob 5:17-26.

*sed min ne trovos. Tial ke ili malamis scion, kaj timon antaŭ la Sinjoro ili ne deziris havi, ili ne deziris miajn konsilojn, ili malestimis ĉiujn miajn predikojn: 6 ili manĝu la fruktojn de sia agado, kaj ili satiĝu de siaj pripensoj. 7 Ĉar ili misagis kontraŭ etuloj, ili mortos, kaj la juĝo pereigos la maliculojn. Sed kiu min aŭskultas, tiu loĝos sendanĝere, kaj estos trankvila, kaj ne timos malbonon*⁸⁷.

Lasta admono

58:1 Tial obeemaj ni estu al la plej sankta kaj glora Nomo, samtempe eskapante la menciitajn minacojn de la Saĝeco kontraŭ la malobeemaj, por ke sendanĝere ni loĝu fidante je lia plej granda kaj majesta Nomo. 2 Akceptu niajn konsilojn, kaj vi ne havos kialon por penti pri tio. Ĉar kiel vivas Dio, kaj kiel vivas la Sinjoro Jesuo Kristo, kaj la sankta Spirito, la fido kaj la espero de la elektitoj: kiu humile kaj en persista mildeco plenumas la preceptojn kaj ordonojn de Dio, tiu trovos lokon kaj havos nomon inter la nombro de tiuj, kiuj saviĝis per Jesuo Kristo, al kiu estu la gloro por eterna eterneco. Amen.

Preĝo

59 :1 Sed se kelkaj homoj daŭre plu malobeos al la vortoj, kiujn per ni li diris al ili, tiam ili sciuj, ke ili kulpas pri ne eta peko kaj ke ili estas en ne malgranda danĝero. 2 Sed ni restos senkulpaj pri tiu peko kaj insiste ni preĝos kaj petegos la Kreinton de la universo, ke la nombron kalkulitan de Liaj elektitoj tra la tuta mondo Li gardu sendamaĝa per Sia amata sklavoj Jesuo Kristo⁸⁸, per kiu Li vokis nin el obskuro al lumo, el senscio al scio pri Lia glora Nomo.

3 <Donu al ni>, ke ni metu nian esperon sur vian Nomon, kiu estas la unua fonto de la tuta kreo. Malfermu la okulojn de nia koro, por ke ni konu nur vin, la Plejaltan en la plejaltaĵoj, la Sanktan, kiu loĝas inter la sanktaj, *vi, kiu humiligas la fieron de la orgojluloj, neniigas la arogantecon de la gojoj, vi, kiu altigas la humilulojn, kaj humiligas la altulojn, vi, kiu riĉigas kaj*

⁸⁷ Sentencoj 1:23-33.

⁸⁸ Didaĥeo 9:2; 10:2-3.

*faras malriĉaj, vi kiu mortigas kaj faras vivaj, vi, sola Bonfaranto de spiritoj, kaj Dio de ĉiu karno; vi, kiu rigardas en la abismojn, vi, kiu rigardas la agojn de la homoj, la Helpanto de ĉiuj en danĝeroj, la Savanto de malesperantoj, Kreanto kaj Reganto de ĉiuj spiritoj, vi, kiu kreskigas la popolojn de la tero, vi, kiu elektas ĉiujn, kiuj vin amas per Jesuo Kristo, via amata sklavo, per kiu vi edukis, sanktigis kaj honoris nin*⁸⁹.

4 Ni petas vin, Sinjoro: estu nia Helpanto kaj Protektanto. Savu tiujn inter ni, kiuj estas en mizero, levu la falintojn kaj la kurbigitojn⁹⁰. La malfortajn sanigu, la erarantojn de via popolo rekonduku, nutru la malsatantojn, liberigu tiujn inter ni en katenoj, restarigu la malfortajn, kuraĝigu la timemulojn. Ĉar eksciuj ĉiuj popoloj, ke Vi estas la Sola Dio, kaj Jesuo Kristo via filo, kaj ni *Via popolo kaj la ŝafoj de Via greĝo*⁹¹.

60 :1 Per viaj faroj vi konigis la eternan strukturon de la mondo; vi, Sinjoro, kreis la teron, vi estas fidela tra la generacioj, justa en viaj verdiktoj, mirinda en via forto kaj via grandeco, saĝa en la kreado kaj prudenta ĉe la ordinado de viaj faroj, bona ĉe la videblaĵoj, bonvolema al tiuj, kiuj fidis je vi, pardonema kaj kompatema: pardonu al ni niajn ŝuldojn kaj niajn pekojn kaj neglektojn. 2 Ne kalkulu ĉiujn pekojn de viaj sklavoj kaj sklavinoj, sed purigu nin per la purigo de via vero, kaj gvidu niajn paŝojn por iri en sankteco de koro kaj por fari, kio estas bona kaj deca antaŭ vi, kaj antaŭ niaj estroj.

3 Jes, Sinjoro, montru vian vizaĝon super ni en paco por nia bono, por protekti nin per via fortika mano, por ŝirmi nin kontraŭ ĉio malbona per via levita brako, kaj savu nin de ĉiuj, kiuj malprave malamas nin.

4 Donu konkordon kaj pacon al ni kaj al ĉiuj, kiuj vivas sur la tero, kiel vi donis al niaj patroj, kiam ili alvokis vin en sankteco, fido kaj vero, <ĉar ili estis> obeemaj al via ĉiopova kaj glora Nomo, kaj al niaj estroj kaj regantoj sur la tero.

⁸⁹ i. a. Psalmo 33:10; Jesaja 57:15; 13:11; 1 Samuel 2:6-7; Readmono 32:39.

⁹⁰ Psalmo 145:14.

⁹¹ Psalmo 79 :13.

61:1 Vi, Sinjoro, donis la regadan potencon al ili per via majesta kaj nedirebla povo, por ke, sciante ke gloron kaj honoron vi donis al ili, ni submetiĝu al ili, sen rezistado al via volo; donu vi do, Sinjoro, al ili sanon, pacon, konkordon kaj stabilecon, por ke neriproĉeble ili plenumu la taskon, kiun vi donis al ili. 2 Vi, Sinjoro, ĉiela reĝo de la eterno, vi donu al la homidoj gloron, honoron kaj potencon super ĉiuj aĝoj sur la tero; vi, Sinjoro, gvidu iliajn planojn laŭ tio, kio estas bona kaj deca antaŭ vi, por ke pie plenumante en paco kaj mildeco la potencon, kiun vi donis al ili, ili meritu vian gracon. 3 Ho vi, kiu sola kapablas fari tion kaj ankoraŭ multe pli da bonaj aferoj al ni, ni laŭdas vin per via Ĉefpastro kaj Protektanto de niaj animoj, Jesuo Kristo, per kiu estu al vi la gloro kaj la majesto nun kaj de generacio al generacio, kaj por eterna eterneco. Amen.

Resumo kaj fino de la letero

62:1 Koncerne la aferojn de nia adorado de Dio kaj kio estas tre utila por virta vivado por homoj, kiuj deziras pie kaj juste vivi, ni jam sufiĉe konsilis al vi, viroj-fratoj. 2 Ĉar pri fido, pentofaro, sincera amo, sinregado, modereco kaj pacienco ĉiun punkton ni jam tuŝis, rememorigante, ke vi devas sankte plaĉi al la Ĉiopotenca Dio en justeco, vero, kaj eltenemo, flankenmetante malicon kaj en amo kaj paco strebante al konkordo, en daŭra bonvolemo, same kiel niaj menciitaj patroj plaĉis al Li, mense humilaj antaŭ sia Patro kaj Dio, la Kreinto, kaj antaŭ ĉiuj homoj. 3 Kaj des pli volonte ni memorigis tion al vi, ĉar ni sciis bone, ke ni skribas al viroj-fiduloj grande estimataj kaj diligente studentaj en la diroj de l' instruo de Dio.

63:1 Tial estas juste por ni, aliĝi al tiaj kaj tiom da ekzemploj, fleksi la nukon kaj preni la lokon de ebeemo, por forlasi la stultan ribeladon kaj veni al la vera celo, kiu envere kuŝas antaŭ ni senriproĉe. 2 Ĉar grandan ĝojon kaj plezuron vi donos al ni, se vi obeos al tio, kion ni skribis per la sankta Spirito; se la malindan koleron de via ĵaluzo vi forigos, laŭ la peto, kiun ni direktis al vi en ĉi tiu letero pri paco kaj konkordo. 3 Ni ja ankaŭ sendis al vi viroj-fidulojn kaj saĝajn, kiuj de junaĝo ĝis sia oldeco neriproĉinde vivis inter ni, kaj kiuj estos atestantoj inter vi kaj ni. 4 Tion

ni faris, por ke vi vidu, ke estis kaj estas nia granda zorgo, ke baldaŭ vi vivu en paco.

Rekomendo de la senditoj kaj beno

64:1 Fine la Ĉiovidanta Dio, *la Mastro de la spiritoj, de ĉia karno*⁹², kiu elektis la Sinjoron Jesuo Kristo kaj per li nin faris elektita popolo, donacu al ĉiu animo, kiu alvokis lian majeston kaj sanktan nomon, fidon, respekton, pacon, firmecon, paciencon, sobrecon, sanktecon kaj moderecon por plaĉi al Lia Nomo per nia Ĉefpastro kaj Protektanto Jesuo Kristo, per kiu estu al Li gloro kaj majesto, forto kaj honoro, nun kaj por eterna eterneco. Amen.

65:1 Haste vi resendu al ni niajn senditojn, Klaŭdion Efebon kaj Valerion Bitonon, kune kun Fortunato, en paco kaj kun ĝojo, por ke des pli rapide ili raportu al ni pri la paco kaj konkordo, pri kiuj ni preĝis kaj kiujn ni sopiris, kaj ke des pli rapide ni ĝoju pri via bonfarto.

2 La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun vi kaj kun ĉiuj ĉie, vokitaj de Dio kaj de li, per kiu estu al Li gloro, honoro, forto kaj majesto, kaj eterna trono por eterna eterneco. Amen.

⁹² Nombroj 16:22.

La dua letero de Klemento al la Korintanoj⁹³

*Κλήμεντος
προς Κορινθίους Επιστολή β*

Jesuo Kristo kaj nia saviĝo

1:1 Fratoj, ni devas pensi pri Jesuo Kristo, kiel pri Dio, kiel pri *la juĝisto pri vivantoj kaj mortintoj⁹⁴*, kaj ni ne devas malgrande pensi pri nia saviĝo. **2** Ĉar se ni malgrande pensas pri ĝi, ni ankaŭ esperas ricevi malgrande; kaj kiuj aŭskultas, kvazaŭ temus pri aferoj malgrandaj, tiuj pekas, kaj ni pekas, se ni ne scias, de kie ni estis vokitaj kaj de kiu kaj kien, kaj kiom suferis Jesuo Kristo pro ni. **3** Kion do ni prezentu al li rekompence, aŭ kiun frukton ni prezentu indan je tio, kion li prezentis? Ho, kiom ni ja ŝuldas al li! **4** Ĉar li donis al ni la lumon; li alparolis nin, kiel patro siajn infanojn; kiam ni estis pereontaj, li nin savis. **5** Kian laŭdon ni donu al li, aŭ kian pagon ni repagu por ĉio, kion ni ricevis? **6** Blindaj ni estis cerbe, ni adoris ŝtonojn, lignon, oron, arĝenton, bronzon – aferojn, kiujn faris homoj; kaj nia tuta vivo estis nenio alia ol morto. Kovritaj do de obskuro en nia tuta vidado de simila tenebro, pro lia deziro ni ekrigardis, demetinte tiun nubon, kiu nin kovris. **7** Ĉar li kompatis nin kaj zorgeme

⁹³ Efektive ne estas letero, sed eble la plej frua prediko, kiu konserviĝis – de dato kaj aŭtoro nekonata.

⁹⁴ Agoj 10 :42; 2 Tim 4:1; 1 Petr 4:5.

nin savis, ĉar li vidis en ni multe da misirado kaj perdiĝo kaj neniun esperon je saviĝo, krom se li nin savus. 8 Do li vokis nin, kiam ni ne estis, kaj li deziris, ke el la neestado ni estu.

La ĝuo de la saviĝo

2:1 Ĝoju, ho senfruktulino, kiu ne naskis; sonigu kanton kaj ĝojkriu, ho vi, kiu ne suferis naskodoloron; ĉar multaj estos la infanoj de la forlasitino, pli ol de tiu, kiu havas edzon⁹⁵. Kiam li diris: Ĝoju, ho senfruktulino, kiu ne naskis, li celis nin: senfrukta ja estis nia eklezio antaŭ ol estis donitaj al ĝi infanoj. 2 Kiam li diris: Ghojkriu, ho vi, kiu ne suferis naskodoloron, tio signifas: niajn preĝojn sincere ni prezentu al Dio, kaj ni ne konduku malkuraĝe kvazaŭ suferante pri naskodoloroj. 3 Kiam li diris: Pli multaj estas la infanoj de la soleca virino ol tiuj de la virino kun edzo, tio estas dirita, ĉar nia popolo ŝajnas esti senigita de Dio, sed nun, kredante, ni fariĝis pli nombraj ol tiuj, kiuj ŝajnis havi Dion. 4 Kaj alia skribo diras: *Mi ne venis voki justulojn, sed pekulojn*⁹⁶. 5 Tio signifas savi la pekulojn. 6 Ĉar la granda kaj mirinda ne estas subteni tion, kio staras, sed tion, kio falas. 7 Tiel ankaŭ la Kristo volis savi la perditaĵon⁹⁷, kaj multajn li savis, venante kaj vokante ankaŭ nin, kiam ni estis perditaj.

Fidelo al tio, kio nin savis: konfesi lin per niaj agoj

3:1 Ĉar li havis pri ni tian kompatemon, unue, ke ni vivantoj ne oferu al la mortintaj Dioj kaj ne adoru ilin, sed ke ni konu per li la Patron de la vero. Kiu estas la scio koncerne lin, krom ke ni ne neas lin, per kiu ni konas Dion? 2 Tial li mem diras: *Kiu konfesas min antaŭ la homoj, lin mi konfesos antaŭ mia Patro*⁹⁸. 3 Tio do estas nia rekompenco, se ni konfesas lin, per kiu ni saviĝis. 4 En kio ni konfesos lin? Kiam ni faros tion, kion li diras, kaj kiam ni ne misaŭdos liajn ordonojn, kaj kiam ne nur per la lipoj ni honoros lin, sed el tuta koro kaj el tuta konscio. 5 En Jesaja li ankaŭ

⁹⁵ Jesaja 54:1; Galatoj 4:27.

⁹⁶ Mateo 9 :13.

⁹⁷ Luko 19 :10 .

⁹⁸ Mateo 10 :32; Luko 12:8.

diras: *Ĉi tiu popolo honoras min per siaj lipoj, sed ilia koro estas malproksime de Mi*⁹⁹.

Ne ĉiu, kiu diras: Sinjoro, Sinjoro!

4:1 Ni ne nur nomu lin Sinjoro; ĉar tio ne savos nin. 2 Li ja diras: *Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, saviĝos, sed kiu faras la justecon*¹⁰⁰. 3 Tiel do, fratoj, en niaj agoj ni montru ĝin, en nia reciproka amo, en tio, ke ni ne adultu, ne kalumniu nek enviu la alian, sed ni regu nin mem, ni estu kompatemaj kaj bonaj; necesas reciproke kompati, ne esti avaraj. En ĉi tiuj agoj tion ni montru kaj ne en la kontraŭaj: 4 kaj ne necesas timi la homojn, pli ol Dion. 5 Tial, se tion vi faras, diras la Sinjoro: Eĉ se vi estus portataj de mi sur mia brusto, sed ne farus miajn ordonojn, mi forĵetus vin kaj dirus al vi: *For de mi, mi ne scias pri vi, de kie vi venas, vi faras senleĝaĵon*¹⁰¹.

La kristano, fremda al la mondo

5:1 Tial, fratoj, ni forlasu la fremdulecon de ĉi tiu mondo, ni plenumu la volon de tiu, kiu nin vokis, kaj ni ne timu eliri el tiu ĉi mondo. 2 Ĉar la Sinjoro diras: *Vi estas kiel ŝafoj meze de lupoj*¹⁰². 3 Petro respondis al li kaj diris: Kaj se la lupoj disŝiros la ŝafojn? 4 Jesuo diris al Petro: La ŝafoj ne timas la lupojn post la morto; ankaŭ vi ne timu tiujn, kiuj vin mortigas kaj kiuj nenion al vi povas fari, sed timu tiun, kiu post via morto havas la potencon ĵeti vian spiriton kaj vian korpon en gehenon de fajro. 5 Fratoj, vi sciu, ke la migrado de nia karno en ĉi tiu kosmo estas eta kaj mallonga, sed la promeso de Kristo estas granda kaj mirinda kaj ripozo de la estonta regno kaj de eterna vivo. 6 Kio do estas farinda por atingi tion, krom sankte kaj juste konduti kaj konsideri la aferojn de la mondo kiel ne-niajn kaj ne deziri ilin? 7 Ĉar se tiajn aferojn ni deziras, por posedi ilin, ni forfalos de la justa vojo.

⁹⁹ Jesaja 29 :13.

¹⁰⁰ Mateo 7:21.

¹⁰¹ Luko 13:25-27; Mateo 7:23.

¹⁰² Luko 10 :3.

Ne eblas servi al du Sinjoroj

6:1 La Sinjoro diras: *Neniu sklavo povas servi al du sinjoroj*¹⁰³. Se ni deziras servi al Dio kaj al mamono, tio ne bone koheras. 2 *Kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon, sed perdus sian animon?*¹⁰⁴ 3 Ĉi tiu mondo kaj la venonta estas du malamikoj. 4 Ĉi tiu ja laŭdas adulton, korupton, avarecon kaj trompadon, la alia tiujn kontraŭas. 5 Ni do ne povas de ambaŭ esti amikoj; se tiun ni rezignas, la alian ni do devas jesi. 6 Ni opinias, ke estas pli bone malami la ĉitie-aĵojn, ĉar malgrandaj ili estas kaj mallonge-daŭraj kaj pereemaj, kaj ami la aliajn, la bonaĵojn nepereemajn. 7 Farante la volon de Kristo, ni akiros ripozon; ĉar se ne, se ni do malobeos liajn ordonojn, nenio nin savos el la eterna puno. 8 Diras ja ankaŭ la skribo en Jeĥezkel: *Eĉ se restariĝos Noa kaj Ijob kaj Daniel, ne saviĝos iliaj infanoj en la kaptiteco*¹⁰⁵. 9 Se do tiaj justuloj eĉ ne povas kun sia justeco liberigi siajn infanojn, se la bapton ni ne gardis pura kaj senmakula, kun kia konfido ni do povos eniri la palacon de Dio? Aŭ kiu estos nia helpanto, se ni troviĝos sen sanktaj kaj justaj agoj?

La vivo de la kristano, vivo de batalado

7:1 Tiel do, miaj fratoj, ni batalu, sciante, ke en niaj manoj ni havas batalon kaj ke multaj fornavigas al pereemaj bataloj, sed ne ĉiuj atingos kronon, se ne post multa penado kaj bone batalinte. 2 Ni do batalu, por ke ĉiuj ni kronon akiru. 3 Tiel do ni kuru la rektan vojon, la nepereeman batalon, kaj grandamase ni navigu tien kaj ni luktu, por ke ni estu kronitaj; kaj se ni ne ĉiuj atingos la kronon, ni almenaŭ estu proksimaj al la kronado.

4 Ni ja devas scii, ke se iu batalas en pereema batalo, kaj se montriĝas, ke la leĝojn de la lukto li rompas, oni lin batos kaj li estos ĵetita el la stadiono. 5 Kion vi opinias? Kion suferu tiu, kiu rompis la leĝojn de la nepereema batalo? 6 Pri tiuj, kiuj ne gardas la sigelon, diras la skribo: *Ilia*

¹⁰³ Mateo 6:24; Luko 16:13.

¹⁰⁴ Mateo 16:26.

¹⁰⁵ Jeĥezkel 14:14-20 .

*vermo ne mortos kaj ilia fajro ne estingiĝos kaj ili estos speктаĵo por ĉiu karno*¹⁰⁶.

Alvoko al pentemo

8:1 Kiam ni estas surtere, ni pentemu. 2 Ĉar lomo ni estas en la mano de fakulo; ĉar kiel la potfaristo, se li produktas iun vazon, ĝin knedas kaj en siaj manoj ĝin tordas aŭ batas, kaj ree ĝin formas; sed kiam li ĝin metas en fajran fornon, nenion li plu povas fari. Same ankaŭ ni, se ni estas en ĉi tiu mondo, tutkore ni pentu pri la pekoj, kiujn ni faris en la karno, por ke ni estu savitaj de la Sinjoro, dum tempon por penti ni havas. 3 Ĉar post kiam ni foriris el ĉi tiu mondo, nenion ni plu povos konfesi aŭ pripenti. 4 Tial, fratoj, se ni faros la volon de la Patro kaj tenos pura nian karnon kaj gardos la ordonojn de la Sinjoro, ni akiros la eternan vivon. 5 Ĉar diras la Sinjoro en la evangelio: *Se la malgrandan vi ne gardis, kiu donos al vi la grandan? Ĉar mi diras al vi, ke kiu estas fidinda en la malgranda, ankaŭ estas fidinda en la multo*¹⁰⁷. 6 Do tion li diras: gardu la karnon pura kaj la sigelon senpeka, por ke vi atingu eternan vivon.

Nia korpo, templo de Dio

9 :1 Neniu el vi diru, ke tiu ĉi karno ne estos juĝita nek restariĝos. 2 Sciu: en kio vi saviĝis, en kio vi ree povos rigardi, se ne estante en ĉi tiu karno? Necesas do, ke kiel templon de Dio ni gardu tiun ĉi karnon. 4 Ĉar same kiel en ĉi tiu korpo vi estis vokitaj, ankaŭ en ĉi tiu korpo vi estos savitaj. 5 Se la Sinjoro Kristo, kiu savis nin, unue estante spirito, fariĝis karno kaj tiel nin vokis, same ankaŭ ni en ĉi tiu sama karno ricevos nian rekompencan.

6 Ni do amu unuj la aliajn, por ke ni venu en la regnon de Dio. 7 Dum tempon ni havas por saniĝi, ni donu nin al la saniganta Dio, prezentante al Li la repagon. 8 Kian? Pentadon el pura koro. 9 Antaŭscianto Li ja estas de ĉio kaj scianto de niaj koroj. 10 Ni do donu al Li laŭdon, ne nur el la buŝo, sed ankaŭ el la koro, por ke Li akceptu nin kiel infanojn.

¹⁰⁶ Jesaja 66:24.

¹⁰⁷ Mateo 25:21-23; Luko 16:10 -12.

11 Ĉar la Sinjoro ja diris: *Miaj fratoj tiuj ja estas, kiuj faras la volon de mia Patro*¹⁰⁸.

Ni faru la volon de Dio

10 :1 Tiel, niaj fratoj, ni faru la volon de la Patro, kiu nin vokis, por ke ni vivu, kaj ni pleje strebu al la virto; sed la malbonon ni forlasu, kiu logus nin en pekojn, kaj ni fuĝu la malpiecon, por ke la fienco ne atingu nin. 2 Ĉar se ni strebas agi bone, sekvos nin la paco. 3 Pro tiu kialo ne eblas trovi ĝin (pacon), ĉar ili nomas ĝin homaj timoj¹⁰⁹, preferante la ĝuon ĉi tie pli ol la estontan promeson. 4 Ili ja ne scias, kian torturon enhavas la nuna ĝuo, kaj kian ĝuon donos la estonta promeso. 5 Kaj se nur tion ili farus, estus tolerable; sed nun ili plu instruas malbone senkulpajn animojn, ne sciante, ke duoblan kondamnon ili havos, ili mem kaj iliaj aŭskultantoj.

Ni devas obei Dion, fidante je Liaj promesoj

11:1 Kun pura koro ni do servu al Dio, kaj ni estos justaj; sed se ni ne servos Lin, ĉar ni ne fidas je la promeso de Dio, ni estos malfeliĉaj. 2 Ĉar la vorto de profeto diras: *Malfeliĉaj estas tiuj, kies animoj estas malsimplaj, kiuj dubas en la koro, kiuj diras: Tion ni aŭdis en la tagoj de niaj patroj; tagon post tago ni atendis, sed nenion el tio ĉi ni vidis.* 3 *Vi stultaj! Komparu vin kun arbo: ekzemple kun figarbo: unue ĝi perdas la foliojn, jen aperas la ĝermo, poste la kruda bero, fine la uvo.* 4 *Same ankaŭ mia popolo havis suferojn kaj afliktojn, sed poste ricevos bonaĵojn*¹¹⁰.

5 Tial, miaj fratoj, ni ne estu du-mensaj, sed esperplene ni eltenu, por ke ankaŭ la rekompenco ni ricevu. 6 Ĉar fidinda Li estas, kiu promesis, ke al ĉiu rekompenco Li pagos pro liaj agoj. 7 Se do ni faros justecon antaŭ

¹⁰⁸ Mateo 12:50; Luko 8:21.

¹⁰⁹ Mateo 12:50; Luko 8:21.

¹¹⁰ Vidu en *1a letero de Clemens* 23:3-4.

Dio, ni eniros en Lian regnon. Kaj ni ricevos la promesitaĵojn, *kiujn aŭdis neniun orelo kaj vidis neniun okulo, kaj kiuj ne eniris en koren de homo*¹¹¹.

Ni daŭre serĉu la Regnon de Dio

12:1 Ĉiuhore do ni serĉu la Regnon de Dio en amo kaj justeco, ĉar ni ne scias la tagon, kiam Dio aperos. **2** Ĉar la Sinjoro mem, demandite de iu, kiam venos la Regno, diris: *Kiam la du estos unu, kiam la ekstere estos kiel la interne, kaj la vira kun la ina, nek viro nek ino*¹¹². **3** La du estas unu, kiam ni diras la veron reciproke, kaj senhipokrita estas unu animo en du korpoj. **4** Kaj tio ekstere estas kiel tio interne, tio signifas: la animon li nomas kio estas interne, kaj kio estas ekstere la korpon li nomas. Kiel do via korpo vidiĝas, same ankaŭ via animo estu manifesta en la bonaj agoj. **5** Kaj la vira kun la ina, nek vira nek ina, tio signifas, ke frato, vidante fratinton, nenion pensas pri ŝi kiel ino, kaj ke ŝi nenion pensas pri li kiel viro. **6** Se vi tion faras, diras la Sinjoro, venos la regno de mia Patro.

Ne blasfemiĝu la nomo de Dio

13:1 Fratroj, fine ni konvertiĝu, sobraj ni estu por la bono; ĉar ni estas plenaj je multa malsaĝo kaj stulto. Ni forviŝu de ni niajn antaŭajn pekojn, kaj konvertiĝinte anime ni saviĝu. Kaj ni ne estu hom-plaĉantoj nek deziru nur plaĉi al ni mem, sed ankaŭ al la eksteraj homoj pro justeco, por ke oni ne blasfemu la Nomon pro ni. **2** Ĉar diras la Sinjoro: *Ĉiutage Mia nomo estas insultata inter ĉiuj popoloj*¹¹³. Kaj ankaŭ: *Kiel Mia nomo estas blasfemita? En kio blasfemita? En tio, ke vi ne faras, kion Mi volas*¹¹⁴. **3** Ĉar la nacioj, aŭkultante el nia buŝo la dirojn de Dio, miras, kiel belaj kaj mirindaj ili estas. Sed kiam poste ili ekscias, ke niaj agoj ne estas indaj je tiuj diroj, kiujn ni diris, de tio ili turnas en blasfemadon, dirante, ke estas nura fabelo kaj trompo. **4** Ĉar kiam ili aŭdas de ni, ke Dio diras: *Ne estas*

¹¹¹ 1 Korintanoj 2:9 .

¹¹² Nekonata cito, similas je *Evangelio Kopta laŭ Tomaso*; similas al Klemento Aleksandria – *Stromata* III. 13, 9 2.

¹¹³ Jesaja 52:5.

¹¹⁴ Nekonata cito.

*merito, ke vi amas tiujn, kiuj vin amas, sed merito estas, se vi amas viajn malamikojn kaj tiujn, kiuj malamas vin*¹¹⁵; kiam tion ĉi ili aŭdas, ili miras pri la surpriza grando de tiu boneco; sed kiam ili vidas, ke ne nur ni ne amas tiujn, kiuj malamas, sed ke ni eĉ ne amas tiujn, kiuj amas, ili insultas nin kaj blasfemas la Nomon.

La spirita eklezio

14,1 Tiel do, fratoj, se ni faras la volon de la Patro, nia Dio, ni estos membroj de la unua eklezio, la spirita, tiu de antaŭ la kreo de suno kaj luno; sed se ni ne faras la volon de la Sinjoro, ni estos sub la skribo, kiu diras: *Mia domo fariĝis nesto da rabistoj*¹¹⁶. Tiel do ni elektu aparteni en la eklezio de la vivo, por ke ni saviĝu. 2 Mi ne kredas, ke vi estas sensciaj, ke *Vivanta eklezio estas la korpo de Kristo*¹¹⁷, ĉar diras la skribo: *Dio kreis la homon vira kaj ina*¹¹⁸. La vira estas Kristo, la ina la eklezio; sed la Biblio kaj la apostoloj ne diras, ke la eklezio estas nun, sed dekomence. Ĉar ĝi estis spirita, same kiel nia Jesuo, sed manifestiĝis en la lastaj tagoj, por savi nin. 3 La eklezio, estanta spirita, manifestiĝis en la karno de Kristo, montrante al ni, ke se iu el ni gardus ĝin en la karno kaj ne koruptus ĝin, li ricevus ĝin en la sankta spirito. Ĉar tiu karno estas bildo de la spirito; neniu do, kiu koruptas tiun bildon, poste ricevos la aŭtentan. Tial li diras tion, fratoj: Gardu la karnon, por ke vi partoprenu en la spirito. 4 Se ni diras, ke la eklezio estas la karno kaj Kristo la spirito, do sekvas, ke kiu perfortis la karnon, perfortis la eklezion. Tia persono do ne partoprenas en la spirito, kio estas Kristo. 5 Tia estas la vivo kaj la senmorteco, kiun tiu ĉi karno povas partopreni, se la sankta spirito al ĝi ligiĝas; kaj neniu povas eldiri aŭ vortigi, *kion la Sinjoro preparis*¹¹⁹ por siaj elektitoj.

¹¹⁵ Vidu Luko 6:32 ; atentu pri la diferencoj.

¹¹⁶ Jeremia 7:11.

¹¹⁷ Efezanoj 1:22-23.

¹¹⁸ Genezo 1:27.

¹¹⁹ 1 Korintanoj 2:9.

La gloro por konverti unu animon

15:1 Mi ne kredas, ke trivialan konsilon mi donis pri sinregado; sekvante ĝin neniuj devas penti pri tio, sed li savos sin mem kaj min, kiu konsilis lin. Lia rekompenco pri ĝi ja ne estas eta, se vagantan kaj pereontan animon li forturnis al saviĝo. **2** Ĉar tiun rekompencon ni povas atribui al Dio, kiu nin kreis, se tiu, kiu parolas kaj aŭskultas, ankaŭ legas kaj aŭskultas kun kredo kaj amo. **3** Ni do restu ĉe tio, je kio ni, justuloj kaj sanktuloj, fidis, por ke senĝene ni petu Dion, kiu diras: *Dum vi ankoraŭ parolas, mi diras: jen Mi!*¹²⁰ **4** Ĉi tiu diro estas ja signo de granda promeso: ĉar la Sinjoro ja diras, ke Li estas pli preta doni ol tiu, kiu petas. **5** Se do tian bonecon ni partoprenas, ni ne envidu inter ni pri atingoj de tiaj bonaĵoj. Ĉar kiel grandan plezuron donas tiuj diroj al tiuj, kiuj ilin obeas, same grandan kondamnon ili enhavas por tiuj, kiuj ilin neglektas.

Prepariĝo por la tago de la juĝo

16:1 Fratoj, ĉar ne malgrandan okazon ni havis por penti, dum ankoraŭ eblon ni havas, ni do turnu nin al Dio, kiu nin vokis, ĝis ankoraŭ ni havas iun, kiu nin akceptos. **2** Ĉar se ni rezignas pri tiuj ĝuadoj kaj venkas nian animon per ne-obeado al ĝiaj malbonaj deziroj, ni partoprenos en la komparto de Jesuo. **3** Sciu, ke proksimiĝas jam la tago de la juĝo kiel brulanta forno, kaj kelkaj el la ĉieloj kaj la tuta tero fandiĝos kiel plumbo, kiu fandiĝas en fajro: kaj tiam aperos la kaŝitaj kaj malkaŝitaj agoj de la homoj. **4** Bona estas almozo por penti pri peko; pli bona fastado ol preĝado, sed almozo estas pli bona ol ambaŭ: *Amo kovras ĉiajn pekojn*¹²¹ kaj preĝo el bona konscienco savas de la morto. Feliĉa estas ĉiu, kiu montriĝos plena je ĉi tio; ĉar almozo malpezigas la pekon.

¹²⁰ Jesaja 58:9 .

¹²¹ Sentencoj 10 :12.

Ni strebu al la saviĝo de niaj fratoj

17:1 Tutkore ni do pentu, por ke neniu el ni pereu. Ĉar se ordonojn ni havas, por ke ni nin tenu for de la idoloj kaj instruu aliajn fari la samon, des pli forte do ni laboru, por ke animo, kiu jam konas Dion, ne perdiĝu. 2 Reciproke ni do helpu nin kaj la malfortajn ni direktu al la bono, por ke ni ĉiuj saviĝu kaj ni konvertu unuj la aliajn kaj instruu. 3 Kaj ne nur nun ni ŝajnu kredi kaj atenti, kiam admonas nin la presbiteroj¹²², sed ankaŭ, kiam ni retiriĝas en la hejmon, ni memoru la ordonojn de la Sinjoro kaj ni ne estu forlogataj de la deziroj ĉi-mondaj, sed ĉiam pli ni proksimiĝu al la ordonoj de la Sinjoro, por ke ĉiuj unuanime ni unuiĝu en la vivo. 4 Ĉar diras la Sinjoro: *Mi venas por unuigi ĉiujn popolojn, tribojn kaj lingvojn*¹²³; tio indikas la tagon de Lia apero, kiam Li venos liberigi nin, ĉiun laŭ liaj agoj. 5 Kaj la nekredantoj vidos Lian gloron kaj potencon, kaj kiam la reĝecon de la mondo ili vidos en Jesuo, ili diros plenaj je surpriziĝo: Ve al ni, ĉar estis vi, kaj ni ne sciis kaj ni ne kredis kaj ni ne fidis je viaj presbiteroj, kiuj mesaĝis al ni pri nia saviĝo: *Ilia vermo ne mortos kaj ilia fajro ne estingiĝos, kaj ili estos abomenindaĵo por ĉiu karno*¹²⁴. 6 Pri la granda tago de la juĝo li parolas, kiam ili vidos tiujn inter ni, kiuj kulpis pri malpieco kaj kiuj mistaksis pri la ordonoj de Jesuo Kristo. 7 Sed la justuloj, kiuj faris la bonon kaj eltenis la elprovojn kaj malamamis la psikan sinkontentiĝon, – ĉiufoje kiam ili vidas, kiel tiuj, kiuj misiris kaj per vortoj aŭ agoj negis Jesuon, nun estas punataj en neestingebla fajro, honoros sian Dion, dirante, ke estas espero por tiu, kiu servis Dion per sia tuta koro.

Humila konfeso de la predikanto

18:1 Sed ni, do, apartenu al la nombro de tiuj, kiuj dankodiras, kiuj servas al Dio, kaj ne al la nombro de tiuj, kiuj estos juĝataj malpiaj. 2 Mi mem ja plene estas pekulo kaj ankoraŭ ne eskapis la tentojn, sed meze de

¹²² Pliaguloj.

¹²³ Jesaja 66:18.

¹²⁴ Jesaja 66:24.

la instrumentoj de la diablo mi strebas sekvi la justecon, por ke mi almenaŭ estu proksima de ĝi, ĉar mi timas la estontan juĝon.

Li petas rekompencan pri sia admono

19 :1 Tiel, fratoj kaj fratinoj, post la Dio de la vero mi direktas al vi peton, ke vi atentu pri la vortoj, kiuj estas skribitaj, por ke vi savu vin mem kaj lin, kiu oficas kiel lektoro en via mezo; kiel rekompencan mi petas de vi, ke tutkore vi pentu, dum saviĝon kaj vivon vi donas al vi mem. Tion farante ni starigos celon por ĉiuj junuloj, kiuj volas klopodi pri la pieco kaj la boneco de Dio.

2 Kaj ni ne estu malkontentaj nek ĉagreniĝu, en nia stulteco, kiam iu nin admonas aŭ turnas nin de maljusto al justeco. Ĉar foje ion maljustan ni faras sen scii tion pro la falseco kaj senkredo en niaj koroj, *mallumigitaj en nia intelekto*¹²⁵ de la vanaj deziroj. 3 Ni faru do justecon, por ke ĝisfine ni saviĝu. Feliĉaj, kiuj obeas la ordonojn; eĉ se mallongatempe ili suferas ĉimonde, la senmortan frukton de la resurekto ili rikoltos. 4 La piulo do ne lamentu, se en la nuna momento li elproviĝas, ĉar benata tempo atendas lin; ĉar supre kun la patroj li resurektos kaj ĝojos en la senĉagrena eterno.

Pieco, ne gajno – la vera riĉeco

20 :1 Sed tio ĉi ne konfuzu nian menson, ke ni vidas la maljustulojn en riĉeco kaj la sklavojn de Dio en premateco. 2 Tial, fratoj kaj fratinoj, ni fidu; en elproviĝo de la Vivanta Dio ni luktas, kaj ni trajniĝas en la nuna vivo, por ke en la venonta vivo ni ricevu la kronon. 3 Neniu el la justuloj ricevis baldaŭ frukton, sed atendis ĝin. 4 Ĉar se Dio la premion por la justuloj haste donus, tuj komercon ni el ĝi farus – ne piecon; ĉar ni ŝajnus esti justaj, ne sekvante la piecon, sed la gajnon. Tial la juĝo de Dio konfuzas la spiriton, kiu ne estas justa, kaj pezigas ĝin per piedĉenoj.

¹²⁵ Efezanoj 4:18.

Fina preĝo

5 Al la sola Dio, la nevidebla, la Patro de la Vero, kiu sendis al ni la Savanton kaj la Unuan de la senmorteco, per kiu Li manifestis al ni la veron kaj la enĉielan vivon, al Li estu la gloro en ĉiuj jarcentoj de la jarcentoj. Amen.

La martiriĝo de Klemento, papo de Romo

Klemento, plaĉa al la Helenoj ...

1:1 La tria, kiu gvidis la Eklezion de Romo, estis Klemento, kiu sekvis la saĝon de la apostolo Petro kaj tiel avancis en ĉio, ke li faris sin amata al la Judoj, la Helenoj kaj al ĉiuj popoloj Kristanaj. **2** Amis lin la Helenoj, ĉar, ne naŭzoplene, sed rezozante, li montris al ili, citante el iliaj propraj libroj kaj instruoj, kiel estiĝis kaj de kie originis la Dioj, kiujn ili konsideris kaj adoris kiel tiajn; kaj kiujn heroaĵojn ili faris, kaj kiel, fine, tion ili faris, li montris al ili per plej klaraj pruvoj. Kaj al la Helenoj, persone, li instruis, ke ilin pardonos Dio, kondiĉe, ke ili foriru de ilia kultado.

... kaj al la Judoj

2:1 Ĉe la Judoj li ekhavis plaĉon, montrante al ili, ke iliaj patroj estis amikoj de Dio, substrekante, ke ilia leĝo estas sankta kaj plej benata, ke ili heredos la unuan lokon apud Dio, kondiĉe, ke la misterojn de sia propra leĝo ili atentu kaj ne neu, ke la promesoj faritaj al Abraham plenumiĝis en Kristo, **2** ĉar en tiu semo de Abraham Dio promesis, ke heredos ĉiuj popoloj, kaj kion li diris al David: Frukton de via ventro Mi sidigos sur via trono¹²⁶ kaj ankaŭ ĉe la profeto Jesaja: La virgulino gravediĝis kaj ŝi naskos filon, kaj lia nomo nomiĝos Emanuel¹²⁷.

¹²⁶ Psalmo 132:11.

¹²⁷ Jesaja 7:14.

... kaj al la Kristanoj

3:1 Speciale de la Kristanoj li estis amata, ĉar li tenis liston laŭnome de la malriĉuloj de ĉiu regiono de Romo, kaj li ne konsentis, ke kiujn li lumigis per la beno de la bapto, ke tiuj bezonu publikan subtenon. **2** Kaj en la ĉiutaga predikado li admonis al homoj de meza riĉeco kaj al riĉuloj, ke ili ne toleru, ke la malriĉaj lumigitoj publike prenu la manĝon el la manoj de Judoj kaj Helenoj, kaj ke vivo, kiu estas purigita per la beno de la bapto, malpurigu sin per donacoj de la Helenoj.

Sisinio, malamiko de Klemento

4:1 Per tiuj kaj multaj aliaj virtofloroj Klemento plaĉis kaj al Dio kaj al ĉiuj saĝaj homoj; ĉar al la malsaĝaj homoj eble nenio estas plaĉa, kio montriĝas plaĉi al Dio. **2** De tio venas, ke la maljustaĵojn de la homoj neraciaj ne timis tiuj, kies intenco estis ne perdi kuraĝon antaŭ la malplezuro de la amaso. Kaj tiel do la plej feliĉa Klemento, episkopo de la Roma seĝo, povis ne timi Sisinion, amikon de la imperiestro Nervo.

Puno de Sisinio

5:1 Kiam do Teodora, la edzino de Sisinio, per la instruo de Klemento fariĝis kredanta kaj ĉiun sian penadon metis en la servadon al Dio, ŝia edzo, pro ĵaluzo volis surprizi ŝin, kiam ŝi ekiros al la eklezio. **2** Kaj kiam ŝi do eniris, tra alia pordo enveninte Sisinio komencis serĉi ŝin, sed kiam la sankta Klemento faris la preĝon kaj la popolo respondis Amen, Sisenio fariĝis blinda kaj surda, tiel ke li ne povis vidi nek aŭdi. **3** Tiam li diris al siaj sklavoj: Prenu min kaj konduku min eksteren, ĉar miaj okuloj fariĝis blindaj kaj miaj oreloj tiel surdiĝis, ke entute nenion ili plu povas percepti.

Rondiro tra la preĝejo

6:1 Tiam liaj junuloj ekkaptis lin kaj kondukis lin tra la tutan preĝejon meze de la preĝanta popolo de viroj kaj virinoj, kaj la pordon, tra kiu ili envenis, ili ne plu povis trovi. Kaj kiam ili ĉirkaŭiris, rondirante kun la sinjoro ĉe la mano, ili venis al la loko, kie Teodora, ilia estrino, preĝis al

Dio. 2 Ŝi vidis, ke la sklavoj rondiras kun sia blindiĝinta mastro kaj unue ŝi ŝanĝis la rigardon, kredante ke ŝia edzo ŝin rigardas per malfermitaj okuloj, kaj ŝi venigis unu el siaj sklavoj por ekscii, kion li volas rondirante kun sia mastro, kaj li diris: Nia mastro volante vidi, kion li ne rajtas vidi, kaj aŭdi aliulajn misterojn, fariĝis blinda kaj surda, kaj al ni li ordonis, ke de tie ĉi ni forkonduku lin, sed al ni ne estas permesite iel ajn forkonduki lin eksteren.

Preĝo de Teodora

7:1 Kiam Teodora tion aŭdis de la sklavo, ŝi sin metis al preĝado kaj sub larmoj ŝi petis Dion, ke ŝia edzo povu eliri de tie; kaj turninte sin al la servistoj, kiuj iris kun li, ŝi diris: Foriru kaj konduku je la mano vian sinjoron al lia domo, ĉar mi la preĝon, kiun mi komencis, ne delasos, sed mi prezentos oferaĵon al la Sinjoro kaj kiam finiĝos la misteroj, mi vin sekvos. 2 Tiam la sklavoj foriris, mankondukante lin hejmen, kaj direktante sin al sia sinjorino, ili sciigis, ke li restas blinda kaj surda. 3 Teodora des pli forte petis Dion kaj ŝutis larmojn, por ke Lia kompatemo helpu al ŝia edzo. Kiam la liturgia solenaĵo finiĝis, ŝi falis al la benata Klemento je la piedoj, rakontante al li ĉion, kio okazis al ŝia edzo, kaj ke blinda li estas okule kaj surda orele.

Klemento vizitas Sisinion

8:1 Kiam tion aŭdis la sankta Klemento, kun larmoj en la okuloj li admonis la ĉeestantojn, ke unuanime ili petu la Sinjoron redoni al ŝia edzo la aŭdon kaj la vidon. 2 Kuraĝe la sankta Klemento post la preĝo iris kun la virino al ŝia edzo, kaj trovis lin kun malfermitaj okuloj sed nenion vidanta, kaj li ankaŭ perceptis neniun vorton aŭ sonon. Tiam ĉiuj samtempe eklamentis ke Sisenio nenion perceptis.

Preĝo kaj miraklo. Maldankemo de Sisinio

9 :1 Tiam do sankta Klemento kurbigis la genuojn antaŭ Dio kaj diris: Sinjoro Jesuo Kristo, kiu la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo donis¹²⁸ al via apostolo Petro, mia instruinto, kaj diris: Kion vi malfermas, estas malfermita, kaj kion vi fermas, estas fermita; vi ordonu do, ke malfermiĝu la oreloj kaj la okuloj de tiu ĉi homo, ĉar vi diris: Kion vi petas, kredante, tion vi ricevos¹²⁹ kaj tiu ĉi via promeso restas de jarcento ĝis jarcento. Kaj apenaŭ ĉiuj respondis Amen, kaj tuj malfermiĝis la oreloj kaj okuloj de Sisinio. **2** Sed kiam Sisinio vidis la sanktan Klementon stari kun lia edzino, li miris, pensante kio povas esti, kaj supozante, ke li estas ridindigita per magiaj artoj, li komencis ordoni al siaj sklavoj kaj diris: Kaptu episkopon Klemento, ĉar li iris al mia edzino kaj per sia magia arto li estigis al mi tiun blindecon.

Nova miraklo: anstataŭ la sanktulon oni arestas kolombojn

10 :1 La homoj, kiuj ricevis la ordonon aresti kaj forkonduki Klementon, ligis kelkajn kolombojn, kiuj tie troviĝis, kaj portis kelkajn de interne eksteren, aliajn inverse. Al Sisinio ŝajnis, ke la sanktan Klementon ili arestis kaj fortiris. **2** Tion vidante la sankta Klemento diris: La malmoleco de via koro ŝanĝiĝis en ŝtonojn; ĉar ŝtonojn vi konsideras Dioj, estas via sorto kuntiri ŝtonojn.

Apero de Sankta Petro

11:1 Sed li, kvazaŭ la sanktulon vere li ligis, fanfarone diris: Mi lasos vin ekzekuti kiel ekzemplon por ĉiuj magiistoj. **2** Tiam do, post preĝo kaj beno pri lia edzino, la sankta Klemento foriris, sed unue li ordonis al ŝi, ke ŝi absolute ne ĉesu preĝi, ĝis la Sinjoro bonvole montros sian juĝon pri ŝia edzo. **3** Kiam Teodora ploris, je vesperiĝo aperis viro respektinda pro sia griza hararo kaj diris: Pro vi saniĝos Sisinio, por ke plenumiĝu, kion diris mia frato la apostolo Paŭlo: La nekredanta edzo estas sanktigita per

¹²⁸ Mateo 16:19.

¹²⁹ Mateo 21:22.

la edzino kredanta¹³⁰. 4 Post tiu diro li malaperis el ŝia vido; de tio fariĝis nedubinde kaj klarege, ke tie aperis la sankta apostolo Petro.

Sisinio konsciiĝas pri si mem

12:1 Kaj efektive tuj Sisinio vokis Teodoran kaj diris al ŝi: Mi petas vin, ke vi preĝu al via Dio, ke Li ne koleru kontraŭ mi. Ĉar pro ĵaluzo al vi mi prezentiĝis kaj eniris en la preĝejon post vi, kaj ĉar mi volis vidi la tie celebratajn misterojn kaj esti orelatestanto de kio diriĝas, tial la vidon kaj la aŭdon mi perdis. 2 Nun la ĉeesto de Klemento faris min ricevi tiujn; mi do petas, ke li venu al mia domo kaj instruu al mi la veron. Al mi kaj al miaj sklavoj ŝajnis tre facile ligi Klementon kaj liajn klerikojn en enŝlosi lin; sed ŝtonojn kaj kolombojn ili kaptis kaj enŝlosis.

Sisinio konvertiĝas

13:1 Tiam Teodora iris al la sankta Klemento kaj rakontis al li ĉion, kion ŝi vidis kaj kion ŝia edzo al ŝi diris. 2 Kiam la sanktulo venis en la domon de Sisinio, li estis akceptita kun multa honoro, kaj kiam li aŭdis de Klemento, kion li havas en si por konstruado de sia animo, li kredis je Dio el tuta koro kaj li falis antaŭ li surgenue kaj kriis:

Parolado de Sisinio

14:1 Mi dankas al la vera kaj ĉiopova Dio, kiu min tial blindigis, por ke mi ekvidu Lin, kaj pro tio la aŭdon forprenis, por ke, se la veron foje pro nescio mi priridis, en Li la aŭdon mi ricevu; kaj tion mi kredis mensogo, kio envere estis la vero: mi opiniis tion vera, kio montriĝis mensogo: la obskuron mi prenis por lumo, kaj la lumon obskuro mi nomis. 2 Sed mia intelekto puriĝis de la stulteco de la idoladoro; ĉar vere mi nun scias, ke la demonoj trompas la homojn, por ke de tiuj, kiuj ne kredas, ke Kristo estas Dio, estu adorataj ŝtonoj kaj rokoj surdaj kaj mutaj, same kiel ankaŭ min ili obsedis ĝis nun. 3 Dum tion kaj similajn aferojn diris Klemento, leviĝis granda ĝojo; ĉar li kun sia tuta domo fariĝis kredanta, kaj doninte

¹³⁰ 1 Korintanoj 7:14.

la nomon, kiam venis pasko, li estis baptita, li mem kaj ĉiuj en lia domo. La baptitoj, viroj kaj virinoj, kun la infanoj estis kvarcent dudek tri entute. Kaj pere de tiu Sisinio multaj nobeloj kaj amikoj de imperiestro Nervo ekkredis kaj turnis sin al Dio.

15:1 Tiutempe la ##komes¹³¹ de la oficistoj, Publio Torkutiano, vidante la nekalkuleblan amasegon, kiu konvertis sin al la fido de Kristo, kunvokis la estrojn de la regionoj, kaj donis al ili monon kaj konvinkis ilin, ke tumulton ili faru kontraŭ la nomo Kristana.

Eksplodas tumulto

16:1 Dum la prefekto Mamertino regis la politikan sidejon de la Urbo Romo, estiĝis ribelo de la popolo de Romo kontraŭ la nomo Klemento, kaj konfuzitaj unuj kontraŭ la aliaj, kelkaj kriis kontraŭ li unu aferon kaj aliaj alian. Ree aliaj rekriis: Kiun malbonon li faris kaj kiun bonan li ne faris? Ĉiu malsanulo de li vizitita, atingis sanon; kiu trista alvenis ĉe li, ĝoja foriris; neniun iam ajn li nocis, ĉiujn li bontraktis. 2 Aliaj per Diabla spirito kriis: Per sorĉistaj rimedoj tion li faris, li detruis la kulton al niaj Dioj; li diras, ke Zeŭso ne estas Dio: pri Herkulo, nia gardisto, li diras, ke estas malpura spirito; Afroditan, la grandan, li nomas putino; pri Hestia, la granda Diino, li blasfemas, ke oni donu al ŝi flameton. 3 Sammaniere li blasfemas la plej sanktan Atenan, kaj Artemisan kaj Hermeson, kaj simile ankaŭ Kronoson kaj Areson li malbenas; kaj ĉiujn nomojn de niaj Dioj kaj iliajn templojn li malhonoras. Aŭ Klemento oferu al niaj Dioj, aŭ li mem estu neniigita.

Sankta Klemento antaŭ la prefekto Mamertino

17:1 Tiam Mamertino, la urbestro, kiu ne povis toleri la ribelon de la popolo, ordonis, ke oni konduku al li la benatan Klementon, kaj kiam apenaŭ li ekvidis lin, li komencis diri: El bona radiko vi ekkreskis, kion al ni atestas la amaso de Romo; sed vi kulpas pri misvojiĝo, kaj tial mi ne toleras la silenton, ĉar vi adoras iun nekonatan Kriston kaj akceptas doktrinojn kontraŭ la Dioj; tial vi devas demeti de vi tiun superfluan

¹³¹ la Akompananto, Grafo.

superstiĉon kaj adori la tradiciajn Diojn. 2 Tiam la feliĉa Klemento diris: Jen la prudento de via alteco alvenas al mia defendo kaj ne akuzas min pri la ribelo de la senkulturaj homoj, sed pri mia propra diro. Ĉar se multaj hundoj ĉirkaŭbojas kaj disŝiras nin, ĉu ili povas depreni de ni, ke ni estas homoj raciaj, sed ili disŝirantaj hundoj? Ribelo ja ofte devenas de senkulturaj homoj, ĉar nenion certan aŭ veran ĝi enhavas. 3 Tial serĉu do eblecon por silenti, en kiu la racia homo sin dediĉu al pripenso kaj diskuto pri sia saviĝo, por ke li trovu la veran Dion, al kiu respektoplene li redonu la fidon.

Raporto al Trajano kaj ties verdikto

18:1 La prefekto Mamertino sendis raporton al la imperiestro Trajano, kaj informis lin pri la nomo de la sankta Klemento: Tiun ĉi Klementon la popolo ne ĉesas serĉi kun ribela kriado, kaj ne eblas trovi unu fidindan akuzon kontraŭ li. 2 Tial la imperiestro Trajano reskribis, ke aŭ li devas konsenti en oferado aŭ suferi ekzilon plej fore de la maro kaj de Ponto en dezerto apude al la urbo Ĥerson¹³².

Sendita en ekzilon

19 :1 Kiam la verdikto de Trajano estis subskribita, Mamertino klopodis, por ke Klemento ne petu pri libervola ekziliĝo, sed ke preferu li oferu al la Dioj. Sed la benata Klemento klopodis por direkti la pensojn de la juĝisto mem al la fido je Kristo, kaj por montri al li, ke li mem pli preferas ol timas ekzilon. 2 Kaj la Sinjoro donis al Klemento tian gracon, ke lin priploris la prefekto Mamertino kaj diris: La Dio, al kiu sincere vi servas, Li helpu vin en tiu ĉi verdikto de ekziliĝo. Kaj li dekretis por li ŝipon kaj enmetis en ĝin ĉion por la vojaĝo necesan kaj hastis for. Kaj li ne estis sola, sed multaj piaj homoj el la popolo lin akompanis.

¹³² en Trakio.

Alveno en la lando de la ekzilo

20 :1 Sed kiam en la lokon de la ekzilo li alvenis, li trafis en la laborejoj de la marmorminejo pli ol du mil kristanojn, kiuj estis kondamnitaj por longa tempo. 2 Kiam la sanktan kaj prihimnatan Klementon ili vidis, ĉiuj samtempe kun ĝemado kaj lamento ekkuris al li kaj diris: Preĝu por ni, sankta ĉefpastro, ke indaj ni montriĝu pri la promeso de Kristo. 3 Kiam la sankta Klemento eksciis, ke ili estas ekzilitaj pro Dio, li diris: Ne senkiale la Sinjoro min tien ĉi sendis, sed por ke estiĝinte partoprenanto en viaj suferoj, mi donu al vi ekzemplon de konsolo kaj de pacienco.

La fonto, kiu ekŝprucis el la roko

21:1 Li eksciis de ili, ke de ses mil mejlon¹³³ akvon ili alportas sur la propraj ŝultroj. Tuj do la sankta Klemento ordonis: Preĝu ni do nian Sinjoron Jesuon Kriston, ke por la konfesantoj de lia fido Li malfermu fonton da akvo; kaj kiu frapis la rokon en la dezerto de Sinajo¹³⁴ kaj elfluis akvo ĝissatiĝe, tiu donos al ni abundan fonton, por ke per lia beno ni ĝoju. 2 Kiam finiĝis lia preĝo, li rigardis tien kaj reen, kaj jen ŝafidon li vidis stari, kiu la dekstran kruron movis, kvazaŭ montrante al la sankta Klemento tiun lokon. Tiam la sankta Klemento ekkonsciis, ke estas la Sinjoro, kiun nur li kaj absolute neniu alia vidas, kaj li iris al tiu loko kaj diris: Je la mono de la Patro kaj la Filo kaj la sankta Spirito fosu en tiu loko. 3 Kaj kiam ĉiuj ĉirkaŭe per siaj fosiloj ekfosis, sed ne en la loko mem, kie staris la ŝafido, la sanktulo ekprenis etan fosileton kaj per leĝera prapeto batis la lokon sub la piedo de la ŝafido, kaj de tie tuj aperis fonto belega je ĝiaj vejnoj da akvo, kiuj gaje bobelis, kaj kiuj elverŝiĝis kun forto kaj formis riveron. Tiam inter ĉies jubilo diris la sankta Klemento: Estas rivero, kies torentoj ĝojigas la urbon de Dio¹³⁵.

¹³³ Romia majlo = 1472,5 m.

¹³⁴ Eliro 17:6.

¹³⁵ Psalmo 46:5.

Amasa konvertiĝo

22:1 Ĉe la famo de tiu miraklo amasiĝis la tuta provinco, kaj ĉiuj, kiuj alvenis pro la instruo de la sankta Klemento, turnis sin al la Sinjoro, tiel ke ĉiutage aldoniĝis ĉirkaŭ kvindek mil baptitoj. 2 Kaj en unu jaro estis konstruitaj tie por la fiduloj sepdek kvin preĝejoj, kaj ĉiujn idolojn oni diserigis, ĉiujn templojn de la ĉirkaŭo oni neniigis, ĉiujn sanktajn arbaretojn je tricent mejloj ĉirkaŭe oni dehakis kaj neniigis.

Raporto al Trajano kaj martiriĝo de Klemento

23:1 Tiam ĵaluza raporto venis al Trajano pri tio, ke la popolo kristana tie kreskis ĝis nenombrebla amaso. Kaj li sendis generalon Aufidianon, kiu per multaj tormentoj mortigis multajn kristanojn. Sed kiam li vidis, ke ĉiuj kun ĝojo ekiras al la martiriĝo, li cedis al la plimulto, sed li kontentigis sin kaptante nur la sanktan Klementon. 2 Kaj kiam li vidis, ke li estas tiel forta en la Sinjoro kaj entute ne volis nei, li diris al la servistoj: Kaptu lin kaj forkonduku lin en la mezon de la maro kaj ligu feran ankron je lia kolo kaj ĵetu lin en la profundon, por ke la kristanoj ne kapablu fortiri lian korpon kaj adori lin anstataŭ Dion.

La maro retiriĝas kaj aperas la korpo

24:1 Kiam tio estis farita, la tuta amaso de la kristanoj, kiu staris ĉe la bordo de la maro, ploris. Kaj tiam diris Kornelio kaj Febo, liaj lernantoj: Ĉiuj samtempe ni preĝu, por ke la Sinjoro montru al ni la kadavron de la sankta martiro. 2 Kiam do ekpreĝis la popolo, la maro retiriĝis en sian propran sinon ĉirkaŭ tri mejlojn. Kaj la popolo paŝis tra seka tero kaj trovis dometon en formo de malgranda templo, kiun Dio disponis, kaj tie kuŝis la korpo de sankta Klemento kaj la ankro flanke de li.

La kulto pri li kaj mirakloj

25:1 Montriĝis al liaj disĉiploj, ke ili ne povis forigi lian restaĵon de tie; sed orakolo diris, ke ĉiujare en la tago de lia martiriĝo la maro retiriĝos sep tagojn, por doni sekan trairon al tiuj, kiuj venos honori lin. Por honori lian nomon la Sinjoro decidis, ke tio okazos ĝis la hodiaŭa tago.

2 Ĉiuj amasoj de la ĉirkaŭaĵo pro ĉi tiu okazaĵo ekkredis je Kristo. Kaj tie do ne plu estas Heleno, nek Judo, nek eĉ iu ajn herezulo. 3 Tial tie realiĝas multaj mirakloj. Blinduloj ekvidas en lia festotago, demonoj estas elpelataj, frostigitoj resaniĝas; kiuj suferas pri la renoj, per nura tuŝado de liaj restaĵoj kaj priŝprucado per akvo benata aŭ trinkado el ĝi ili saviĝas de sia malsano, kaj unuvorte kiuj suferas pri kiu ajn malsano, se ili petas la helpon de ĉi tiu sankta martiro, ili saniĝos. 4 Kaj lia gloro kaj laŭdo restas poreterne dank' al nia Sinjoro Jesuo Kristo, per Kiu kaj kun Kiu estu la gloro al la Patro kun Lia sanktega kaj viviganta Spirito, nun kaj ĝis jarcentoj de la jarcentoj. Amen.
